# ESPERANTO
# DE NIVELO AL NIVELO

**LINGVA EKZAMENO *ORIGÓ***

**VALIDA ĜIS NOVEMBRO 2016.**

**ELTE Origó Nyelvi Centrum**
**Budapest**

**Dua, ĝisdatigita reta eldono 2016.**

Redaktis kaj esperantigis:
KOVÁCS Márta

Provlegis
la paĝojn 7-32:
Probal DASGUPTA, KOVÁTS Katalin,
Rob MOERBEEK, TÖTÖSNÉ GADOS Zsuzsa
la paĝojn 33-72:
KOVÁTS Katalin

Eldonis: ELTE Origó Nyelvi Centrum
Respondeca eldoninto: Antoni Györgyi, direktorino

# ENHAVO

ENKONDUKO ........ 4
**Pri tiu ĉi libro** ........ 5
**Pri la lingva ekzamensistemo *Origo*** ........ 6
TEMARO POR LA PAROLA KAJ SKRIBA EKZAMENOJ ........ 10
Baza nivelo (B1) ........ 11
Meza nivelo (B2) ........ 13
Supera nivelo (C1) ........ 15
PAROLA EKZAMENO ........ 20
**Ekzameno antaŭ la komisiono** ........ 20
Baza nivelo (B1) ........ 20
Meza nivelo (B2) ........ 23
Supera nivelo (C1) ........ 28
**Aŭda kompreno de sonregistraĵo** ........ 33
Baza nivelo (B1) ........ 33
Meza nivelo (B2) ........ 35
Supera nivelo (C1) ........ 37
SKRIBA EKZAMENO ........ 39
Baza nivelo (B1) ........ 39
Meza nivelo (B2) ........ 44
Supera nivelo (C1) ........ 52
SOLVOJ ........ 59
**Solvo de la taskoj de la aŭda kompreno** ........ 59
Baza nivelo (B1) ........ 59
Meza nivelo (B2) ........ 61
Supera nivelo (C1) ........ 63
**Solvo de la skribaj taskoj** ........ 65
Baza nivelo (B1) ........ 65
Meza nivelo (B2) ........ 67
Supera nivelo (C1) ........ 70

# ENKONDUKO

dr. Katalin KOVÁTS

La Konsilio de Eŭropo en 2001 aperigis sian norman libron, gvidilon de lingvoinstruistoj kaj testistoj por unuecigi la postularon kaj la klasifikadon de la lingvoniveloj.
La tielnomata *Komuna Eŭropa Referenckadro* (KER) kaj la en ĝi trovebla ses-ŝtupa priskribo de la lingvoniveloj fariĝis normaj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en multaj landoj de la mondo.

Ni fieras, ke la ampleksa faka verko en 2007 aperis ankaŭ en Esperanto:
(http://edukado.net/ekzamenoj/referenckadro) kaj per tio la internacia lingvo estis agnoskata en Strasburgo kaj ĉe la faka Asocio de Lingvo-testistoj de Eŭropo (ALTE). Tiu agnosko ebligis al niaj fakuloj ellabori kaj lanĉi ekzamensistemon laŭ la KER-postuloj. Tiun taskon UEA solvis kunlabore kun la jam sperta kaj prestiĝa hungara lingvoekzamena centro Origó (pli frue nomata ITK).

La unulingvaj KER-ekzamenoj pri Esperanto startis fine de 2008. Ekde tiam ĝis la fino de 2015 okazis pli ol 50 ekzamensesioj, en kiuj sukcese trapasis la ekzamenojn 1678 personoj. Ili devenas el 66 landoj. Elstaras Francio, en kiu lando ni havas 452 sukcesintojn.

Por plivastigi la eblojn trapasi la ekzamenojn ekde 2012 estas organizataj ankaŭ tielnomataj *Tutmondaj Ekzamentagoj*, kadre de kiuj en pluraj urboj de diversaj landoj oni povas ekzameniĝi en la sama tempo, solvante la samajn taskojn. En la unua jaro estis nur skribaj testoj en tiuj aranĝoj, sed ekde 2013 helpe de la modernaj teknikaĵoj ankaŭ parolaj ekzamenoj trapaseblas.
Danke al tiuj tutmondaj aranĝoj la 50 ekzamensesioj povis disvolviĝi en 77 diversaj urboj, en trideko de ili eĉ plurfoje. Aparte menciindas Moskvo (RU) kaj Greziljono (FR), kie okazis po 5 sesioj.
Krom la tutmonda ekzamentago, ni okazigas jare 4-6 aliajn sesiojn, laŭ la mendoj de la organizantoj de grandaj internaciaj aranĝoj aŭ de landaj kongresoj. Jam tradicie ĉiam okazas sesio dum la Universalaj Kongresoj.

La organizan laboron, komisiite de UEA, gvidas Katalin Kováts, helpe de la de ŝi gvidata retejo edukado.net. En tiu paĝaro eblas trovi ĉiujn informojn pri la ekzamenoj, inklude ankaŭ la aliĝilojn. Tio signifas ke je ajna demando - ĉu pri la organiza parto, ĉu pri la konkretaj ekzamenoj – oni turnu sin al la menciita retejo www.edukado.net/ekzamenoj/ker aŭ mesaĝe al ker-ekzamenoj@edukado.net.

Ĉiu sukcesa kandidato ricevas kvarlingvan (en Esperanto, angla, franca kaj germana) atestilon pri sia lingvokono, eldonitan de la ŝtata universitata lingvocentro ORIGÓ, en Hungario.
La prestiĝo de la KER-atestiloj komencas kreski en la Esperanto-komunumo. Ĉe pli kaj pli da postenoj kaj funkcioj estas postulo la lingvokono kaj ties pruvo per KER-atestiloj, do, ĝi certe signifas avantaĝon je konkuraj situacioj.

Kaj kiucele oni trapasu la KER-ekzamenojn? Simple por altigi la prestiĝon de la lingvo mem, pruvi ke ĝi estas egale grava por ni kiel la aliaj lingvoj, kiujn oni lernas en lernejo, pri kiuj oni ekzameniĝas.
Ekster nia komunumo oni jam agnoskis niajn ekzamenojn, sekve ankaŭ nian lingvon. Venis tempo, ke ankaŭ ene de Esperantujo ni mem serioze kaj inde traktu ĝin.
Ekzameniĝu, provu vin kaj ekposedu oficialan dokumenton pri via kono de Esperanto.
Bonvenon en unu el niaj sekvaj sesioj.

**Pri tiu ĉi libro**

La plej grava rolo kaj utilo de ekzameno, krom la verŝajna praktika flanko (ĝi informas dungantojn, instruejojn pri la nivelo de la kandidato), estas instigi la lingvolernanton mem formuli klarajn kaj plenumeblajn celojn, kaj eventuale helpi ankaŭ la lingvoinstruistojn en la planado de la instruado.

Tiu ĉi libro celas helpi la prepariĝon je la ekzameno per prezentado de aŭtentikaj parolaj kaj skribaj ekzamenmaterialoj. La fakto, ke tiu ĉi internacia ekzameno pri Esperanto estas adapto de la unulingva ekzamensistemo *Origó* signifas, ke la proporcioj kaj daŭro de la ekzamenpartoj, la longeco de la tekstoj kaj la tipo de la ekzamentaskoj estas identaj en ĉiuj lingvoj. Vi trovos en la libro la temaron de ĉiuj niveloj – ankaŭ tiu estas la sama en ĉiuj lingvoj, krom la lasta temo, kiu koncernas Esperanto-kulturon. Kompreneble la lingvokonaj postuloj estas pure lingvospecifaj.

La nivelojn de la parola ekzameno ilustras optimumigitaj, lingve korektitaj ekzameneroj. Estis elektitaj tipaj produktaĵoj de kandidatoj, kiuj kaze de fakta ekzameno estus sukcesintaj.

La skribaj taskoj estas veraj, ne plu uzotaj ekzamenaj materialoj por ilustri la taskojn kaj nivelojn de la ekzamena sistemo.

La sonregistraĵoj de la aŭda kompreno kaj la solvoj de la taskoj troveblas en la paĝo SPECIMENOJ ĉe edukadonet: http://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj

Por modeli solvon de la skriba sinesprimo ni elektis (lingve korektitajn) tekstojn de antaŭtestantoj, kiujn ni opinias taŭgaj por la respektivaj niveloj. Ni ja klopodis doni lingve ĝustajn solvojn, estas tamen grave emfazi, ke por plenumi la koncernan nivelon, ne necesas centprocente kompreni la tekstojn kaj senerare fari la taskojn. Por sukcesa ekzameno oni postulas 60%-an plenumon, do ne falu en panikon pro teksto aŭ tasko, kiu unuavide ŝajnas esti malfacila.

## Pri la lingva ekzamensistemo *Origó*

La Centro por Perfektiĝo pri Fremdaj Lingvoj de la Universitato Eötvös Loránd (ELTE ITK, ekde 2016 ELTE Origó Nyelvi Centrum – ELTE Origó Lingva Centro ) en Budapeŝto, membro de la Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo (ALTE) adaptis sian ŝtate rekonitan unulingvan ekzamensistemon *Origó* al Esperanto. Tiu ĉi lingva ekzameno konforme al la principoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER) testas la kvar bazajn lingvokapablojn – la aŭskultadon kaj parolkapablon, la legan komprenon kaj la skribadon – , kaj per ekzakta pritaksa sistemo informas la ekzamenatojn pri la nivelo de ilia lingvokono.

Dum la parola ekzameno estas pritaksataj la parolkapablo kaj la aŭda kompreno, dum la skriba la skribkapablo kaj la lega kompreno, krome apartenas al tiu parto taskoj, kiuj produktive pritaksas gramatikajn konojn. Temas pri unulingva ekzameno, do ĝi ne taksas la kapablon pri perado/tradukado.

La ekzameno estas proponata je tri niveloj: baza, meza kaj supera. Tiuj niveloj konformas al la priskriboj de la Komuna Eŭropa Referenckadro je B1, B2 kaj C1.

La parola ekzameno (tipo 'A') kaj la skriba (tipo 'B') kune rezultigas la kompletan ekzamenon (tipo 'C'), sed ili plenumeblas ankaŭ aparte. La sukceslimo en ambaŭ tipoj kaj je ĉiu nivelo estas 60%, krome en la plejparto de la taskoj estas postulita 40%-a plenumo.

La ekzamena rezulto estas pritaksata laŭ la sekvaj kriterioj:
en la parola parto

- la komunik-kapablo de la kandidato, taŭga reago, konoj pri la temo
- leksika riĉeco kaj laŭsituacia uzo de la vort-trezoro
- lingva ĝusteco
- aŭda kompreno (aparte de la supra, antaŭkomisiona parto, laŭ sonregistraĵo) en la skriba parto
- ĝenerala kaj detala kompreno de legita teksto
- lingva ĝusteco
- skriba sinesprimo:
    - verkado laŭ la komunika celo kaj ĝenraj postuloj de la tasko (ekz. letero)
    - enhava riĉeco
    - enhava kaj lingva kohereco
    - leksika riĉeco kaj taŭgeco
    - lingva ĝusteco.

La sekvaj tabeloj prezentas laŭnivele la taskotipojn kaj la daŭron de la ekzamenaj partoj, kune kun la sistemo de poentado.

**Baza nivelo (B1)**

Tiu ĉi nivelo baziĝas sur la specifo *Salto* de la Konsilio de Eŭropo. Ĝi pritaksas, ĉu la kandidato kapablas elturniĝi en la bazaj situacioj de la ĉiutaga vivo, komenci kaj vivteni baznivelan komunikadon en sociaj, kulturaj kaj laborejaj rilatoj.

<table>
<tr><th></th><th>Daŭro</th><th>Taskotipo</th><th>Longeco</th><th>Poentoj</th><th>Minumumo</th></tr>
<tr><td rowspan="4">Parole</td><td rowspan="3">ĉ. 10 minutoj</td><td>Libera interparolado pri difinita temo</td><td>ĉ. 4 minutoj</td><td rowspan="3">40*</td><td rowspan="3">16 poentoj</td></tr>
<tr><td>Memstara prezento de temo<br>(surbaze de bilda stimulo; la ekzamenato elektas unu el du bildoj)</td><td>ĉ. 3 minutoj</td></tr>
<tr><td>Situacia ludo<br>(la ekzamenato prenas unu el la laŭtema stoko)</td><td>ĉ. 3 minutoj</td></tr>
<tr><td>30 minutoj</td><td>Aŭda kompreno de sonregistraĵo<br>parte redaktita dialogo (redaktita) teksto el aŭd-vidaj publikaĵoj (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo, ktp.)</td><td>1800-2200 literspacoj</td><td>20</td><td>8 poentoj</td></tr>
<tr><td colspan="4">Parola ekzameno (tipo 'A')</td><td>60</td><td>36 poentoj</td></tr>
<tr><td rowspan="3">Skribe</td><td rowspan="3">120 minutoj</td><td>Lingvokonaj taskoj<br>diverstipaj, gramatikaj kaj leksikaj taskoj (kompletigo el aŭ sen listo, transformo ktp.)</td><td>20 unuoj</td><td>10</td><td>--</td></tr>
<tr><td>Skriba sinesprimo (letero)<br>eblas elekti el du temoj; laŭ kvar aŭ kvin skemeroj</td><td>13-15 linioj (ĉ. 100 vortoj)</td><td>20</td><td>8 poentoj</td></tr>
<tr><td>Lega kompreno<br>unu pli longa aŭ du malpli longaj [redaktita(j)] skribnorma(j) teksto(j) (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo , vera/malvera)</td><td>2600-3000 literspacoj</td><td>20</td><td>8 poentoj</td></tr>
<tr><td colspan="4">Skriba ekzameno (tipo 'B')</td><td>50</td><td>30 poentoj</td></tr>
<tr><td colspan="4">Sume</td><td colspan="2">110</td></tr>
</table>

*Detala prezento de la poentoj de la parola ekzameno antaŭ la komisiono:

| | |
|---|---|
| Komunika valoro, prononco | 15 poentoj (po 5 poentoj en la 3 taskoj) |
| Vort-trezoro | 15 poentoj (po 5 poentoj en la 3 taskoj) |
| Lingva ĝusteco | 10 poentoj |
| **Sume** | **40 poentoj** |

### Meza nivelo (B2)

Tiu ĉi nivelo baziĝas sur la specifo *Flugo* de la Konsilio de Eŭropo. Ĝi pritaksas, ĉu la kandidato kapablas komenci kaj vivteni kompleksan kaj lingve nuancitan komunikadon en sociaj, kulturaj kaj laborejaj rilatoj.

| | Daŭro | Taskotipo | Longeco | Poentoj | Minimumo |
|---|---|---|---|---|---|
| **Parole** | 15 minutoj | **Libera interparolado pri difinita temo** | ĉ. 5 minutoj | 45* | 18 poentoj |
| | | **Memstara prezento de temo** (surbaze de bilda stimulo; la ekzamenato elektas unu el du bildserioj) | ĉ. 5 minutoj | | |
| | | **Situacia ludo** (la ekzamenato prenas unu el la laŭtema stoko) | ĉ. 5 minutoj | | |
| | 30 minutoj | **Aŭda kompreno de sonregistraĵo** parte redaktita dialogo (redaktita) teksto el aŭd-vidaj publikaĵoj (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo, ktp.) | 2600-3000 literspacoj | 25 | 10 poentoj |
| **Parola ekzameno (tipo 'A')** | | | | **70** | **42 poentoj** |
| **Skribe** | 180 minutoj | **Lingvokonaj taskoj** diverstipaj, gramatikaj kaj leksikaj taskoj (kompletigo el aŭ sen listo, transformo ktp.) | 40 unuoj | 20 | -- |
| | | **Skriba sinesprimo (letero)** eblas elekti el du temoj; laŭ kvin skemeroj | 17-20 linioj (ĉ. 150 vortoj) | 20 | 8 poentoj |
| | | **Lega kompreno** unu pli longa aŭ du malpli longaj [redaktita(j)] skribnorma(j) teksto(j) (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo , vera/malvera) | 3200-3600 literspacoj | 20 | 8 poentoj |
| **Skriba ekzameno (tipo 'B')** | | | | **60** | **36 poentoj** |
| **Sume** | | | | **130** | |

*Detala prezento de la poentoj de la parola ekzameno antaŭ la komisiono:

| | |
|---|---|
| Komunika valoro, prononco | 15 poentoj (po 5 poentoj en la 3 taskoj) |
| Vort-trezoro | 15 poentoj (po 5 poentoj en la 3 taskoj) |
| Lingva ĝusteco | 15 poentoj (po 5 poentoj en la 3 taskoj) |
| **Sume** | **45 poentoj** |

**Supera nivelo (C1)**

Tiu ĉi nivelo baziĝas sur la specifo *Aŭtonomeco* de la Konsilio de Eŭropo. Ĝi pritaksas, ĉu la kandidato kapablas uzi la lingvon flekse kaj efike por sociaj, studaj kaj profesiaj celoj; ĉu la kandidato kapablas esprimi sin nuance, kun riĉa leksiko, stile taŭge laŭ diversaj lingvaj skaloj.

| | **Daŭro** | **Taskotipo** | **Longeco** | **Poentoj** | **Minimumo** |
|---|---|---|---|---|---|
| **Parole** | 20 minutoj | **Libera interparolado pri difinita temo** | ĉ. 5 minutoj | 60* | 24 poentoj |
| | | **Memstara prezento de temo** (surbaze de bilda stimulo; la ekzamenato elektas unu el du bildserioj) | ĉ. 5 minutoj | | |
| | | **Situacia ludo** (la ekzamenato prenas unu el la laŭtema stoko) | ĉ. 5 minutoj | | |
| | | **Tekstokomentado** (surbaze de mallonga teksta stimulo) | ĉ. 5 minutoj | | |
| | 40 minutoj | **Aŭda kompreno de sonregistraĵo** (redaktita) teksto el aŭd-vidaj publikaĵoj (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo ktp.) | 3000-3400 literspacoj | 30 | 12 poentoj |
| **Parola ekzameno (tipo 'A')** | | | | **90** | **54 poentoj** |
| **Skribe** | 240 minutoj | **Lingvokonaj taskoj** diverstipaj, gramatikaj kaj leksikaj taskoj (kompletigo el aŭ sen listo, transformo ktp.) | 40 unuoj | 20 | -- |
| | | **Tekstokomentado** (surbaze de mallonga teksta stimulo) | 20-25 linioj (ĉ. 200 vortoj) | 20 | 16 poentoj |
| | | **Skriba sinesprimo (letero)** eblas elekti el du temoj; laŭ kvin skemeroj | 20-25 linioj (ĉ. 200 vortoj) | 20 | |
| | | **Lega kompreno** unu pli longa aŭ du malpli longaj [redaktita(j)] skribnorma(j) teksto(j) (taskoj kun informtransigo, multobla elekto, kompletigo el aŭ sen listo , vera/malvera) | 3600-4000 literspacoj | 20 | 8 poentoj |
| **Skriba ekzameno (tipo 'B')** | | | | **80** | **48 poentoj** |
| **Sume** | | | | **170** | |

*Detala prezento de la poentoj de la parola ekzameno antaŭ la komisiono:

| | |
|---|---|
| Komunika valoro, prononco | 20 poentoj (po 5 poentoj en la 4 taskoj) |
| Vort-trezoro | 20 poentoj (po 5 poentoj en la 4 taskoj) |
| Lingva ĝusteco | 20 poentoj (po 5 poentoj en la 4 taskoj) |
| **Sume** | **60 poentoj** |

# TEMARO POR LA PAROLA KAJ SKRIBA EKZAMENOJ

La temoj de la parola kaj skriba ekzamenoj sekvas realajn vivsituaciojn, ja oni uzas la lingvon ĉiam – kaj parole, kaj skribe – en iu konkreta komunika situacio. Dum la ekzameno estas taksata – krom la laŭtema leksiko kaj lingva ĝusteco – ankaŭ la komunika taŭgeco de la lingvouzo. Dum la parola ekzameno la traktado de la temoj okazas en komunikaj situacioj, temas pri informŝanĝoj. Ene de la temoj la kandidato devos akiri informojn, t.e. starigi demandojn kaj laŭ la respondoj kompreni la informojn, kiujn li/ŝi bezonis. Same li/ŝi devas kompreni la demandojn de la ekzamenanto-partnero; se li/ŝi ne komprenas ion el la demando aŭ respondo, li/ŝi devas elturniĝi per precizigaj demandoj. Sur pli alta nivelo la ekzamenato devas esprimi sian opinion (B2), raporti pri alies opinio kaj argumenti koncerne ankaŭ abstraktajn temojn (C1).

La subaj listoj estas helpiloj por prepariĝi por la ekzameno, sed ili ne estas preciza kolekto de ĉiuj ekzamenaĵoj: en la ekzamenaj situacioj oni povas tuŝi subtemojn, kiuj ligiĝas al tiu temaro, sed ne estas konkrete nomataj.

La temaro de la nivelo B2 enhavas la temojn de B1 kaj tiu de C1 la temaron de la antaŭaj du niveloj.

**Baza nivelo (B1)**

1. **Personaj kaj familiaj indikoj**
   - sinprezento, prezento de sia familio, personaj indikoj
   - profesio de la ekzamenato kaj de familianoj
   - familiaj festoj, tradicioj

2. **Hejmo kaj ĉirkaŭaĵo**
   - prezenti sian domon / loĝejon kaj ĉirkaŭaĵon
   - prezenti sian loĝurbon / loĝkvartalon / vilaĝon
   - studenthejmo, luita loĝejo

3. **Laboro, ĉiutagaj farendaĵoj**
   - profesio kaj laboro de la ekzamenato, ĉi-rilataj planoj
   - profesia orientiĝo
   - tagordo

4. **Lernado**
   - tagordo dum lernado
   - prezentado de sia lernejo, de la studobjektoj kaj instruistoj
   - prijuĝo, notoj, ekzamenoj
   - lernejaj programoj

5. **Komunikado**
   - lingvolernado, ebloj de lingvolernado, la rolo de fremdaj lingvoj en la privata vivo kaj en la profesia laboro
   - kiel telefoni
   - la ĉiutaga rolo de la komputilo kaj interreto

6. **Rilato kun aliaj homoj: privata kaj publika vivo**
   - renkontiĝo, saluto, adiaŭo
   - geamikoj, konatoj, samklasanoj aŭ gekolegoj
   - vestoj
   - komunikiloj: telefono, korespondado ktp.

7. **Libertempo, amuziĝo, kulturo**
   - kiel pasigi sian liberan tempon, ebloj por amuziĝo
   - propra interesiĝo, hobioj
   - televido, radio
   - teatro, kinejo, koncertoj; programo, mendo kaj aĉeto de biletoj

8. **Sano, sporto**
   - farto, sana vivmaniero, korpa higienio
   - oftaj malsanoj, simptomoj, kuracista, hospitala prizorgo
   - sporto, ebloj por sportado, kelkaj sportbranĉoj

9. **Aĉetado kaj servoj**
   - aĉetado en magazeno, butiko, supervendejo; la plej gravaj manĝaĵoj, vestaĵoj kaj mastrumaj artikloj
   - aĉetkutimoj, aĉeto de donacoj
   - servoj: poŝto, banko (sendi leteron, ĝiri monon), frizisto

**10. Manĝado**
- oftaj manĝaĵoj, trinkaĵoj; preferata manĝaĵo; manĝi sane; nacia kuirarto
- manĝi hejme, en la lenejo / laborejo
- manĝi en restoracio (rezervi, mendi, pagi)
- kuirado, gastigo, esti gasto (inviti, akcepti; proponi, regali, laŭdi, danki ktp.)

**11. Trafiko**
- ĉiutaga veturo al la lernejo / laborejo, loka kaj interurba trafiko
- trafikiloj: tramo, aŭtobuso, metroo, aŭtomobilo, biciklo ktp.; aĉeto de biletoj, ekiro kaj alveno de veturiloj; mendo de taksio
- parki aŭtomobilon, aĉeti benzinon, riparigi aŭtomobilon

**12. Vojaĝo**
- vojaĝi per aŭtomobilo, trajno, aŭtobuso, aviadilo, ŝipo; haltejo, stacidomo, ktp.; aĉeti kaj validigi bileton, itinero, ekiro kaj alveno
- vojaĝagentejo, memorganizita vojaĝo
- landlimo: kontrolo de pasporto, dogana kontrolo, monŝanĝo
- tranoktejoj: hotelo, kampadejo ktp; mendi tranoktejon, post alveno: registriĝo, servoj
- rakonti vojaĝtravivaĵojn

**13. Nia medio, la naturo**
- nia natura medio: bestoj, plantoj
- vetero: vetero laŭsezone, nuna vetero

**14. La lando de la ekzamenato**
- la ĉefaj karakterizaĵoj de la lando: situo, ĉefurbo, kelkaj vidindaĵoj
- ĉiutagaĵoj: manĝkutimoj, veturado, vestado, formoj de socia vivo ktp.
- festoj, tradicioj

**15. Esperanto-kulturo**
- informiĝi pri kaj per Esperanto: Esperantaj gazetoj kaj periodaĵoj (prezenti unu), retejoj kaj diskutlistoj (prezenti unu)
- praktika uzo de Esperanto: korespondado, internaciaj kaj landaj kongresoj, kunvenoj (prezenti unu; kiel aliĝi?), Pasporta Servo
- historio de la internacia lingvo: genezo de la lingvo Esperanto kaj ĝia evoluo; Zamenhof
- historio de la Esperanto-movado: la unua Universala Kongreso, Bulonja Deklaracio
- Esperanto-literaturo: originala kaj tradukita literaturo (prezento de unu verkisto/verko)
- organiza vivo: nuntempe funkciantaj organizaĵoj (UEA, TEJO, Landaj Asocioj ktp. – prezenti unu)

**Meza nivelo (B2)**

1. **Personaj kaj familiaj indikoj**
   - prezento de la familianoj kaj geamikoj
   - profesio de la ekzamenato kaj de familianoj, ĉi-rilataj planoj kaj sopiroj
   - ekstera aspekto de iu tria persono, priskribo de karaktero

2. **Hejmo kaj ĉirkaŭaĵo**
   - akiro de hejmo, loĝsituacioj, ideala loĝloko
   - loĝkostoj
   - studenthejmo, luita loĝejo: reguloj, ebloj kaj malpermesoj
   - kunvivo de pluraj generacioj
   - en- kaj ĉirkaŭhejmaj laboroj

3. **Laboro, ĉiutagaj farendaĵoj**
   - popularaj profesioj, rilato al la salajro
   - laborejaj cirkonstancoj: kariero, promociiĝo, problemoj
   - dungiĝo, senlaboreco, sociaj problemoj

4. **Lernado**
   - lernejaj tradicioj, rememorindaĵoj
   - institucia lernado, memlernado, vivlonga lernado
   - lernejtipoj

5. **Komunikado**
   - amaskomunikiloj kaj formado de publika opinio (televido, radio, presaĵoj)
   - rolo de la komputilo en la ĉiutagaĵoj, ĝiaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj
   - interreto

6. **Rilato kun aliaj homoj: privata kaj publika vivo**
   - geamikoj, konatoj, samklasanoj aŭ gekolegoj
   - vestoj, modo
   - kunvenoj, asocia kaj kluba vivo, korespondado
   - civilaj organizaĵoj
   - la publika sekureco

7. **Libertempo, amuziĝo, kulturo**
   - teatro, kino, opero, koncerto
   - televido (tipo de programoj), radio, ĵurnaloj
   - legado: biblioteko, legaĵoj, ŝatataj libroj

8. **Sano, sporto**
   - korpa kaj psika sano
   - prevento de malsanoj, kuracado kaj flegado de malsanuloj
   - ĉe kuracisto, kuracservoj
   - asekuro, medikamentoj, kuracmetodoj
   - fumado, konsumado de alkoholaĵoj kaj drogoj
   - sporto: hobia aŭ konkursa sportado

9. **Aĉetado kaj servoj**
   - tipoj de aĉetejoj
   - aĉetcirkonstancoj, prezoj, pagebloj
   - servoj: poŝto, banko, frizisto, polico, konsulejo, riparejo de aŭtomobilo, purigejo ktp.

- priskribo de servo, ĉi-rilataj spertoj; reklamado
- anoncoj, reklamoj

**10. Manĝado**
- manĝkutimoj
- restoracio kaj aliaj gastigejoj, manĝejoj
- preparado de ŝatataj manĝaĵoj
- sana nutromaniero
- nacia kuirarto de la ekzamenato

**11. Trafiko**
- egalaj ŝancoj en la trafiko: situacio de maljunuloj, personoj kun etinfanoj, infanoj aŭ handikapuloj
- trafikreguloj, trafikmoralo: aŭtomobilstirantoj kaj piedirantoj, motoruloj kaj biciklantoj, uzantoj de publikaj veturiloj
- problemoj en la trafiko, evoluigo de la trafiksistemoj, trafika sekureco

**12. Vojaĝo**
- vojaĝformoj: oficaj kaj turismaj vojaĝoj, memorganizita vojaĝo, vojaĝo organizita de vojaĝoficejo
- tranoktejoj: hotelo, kampadejo, ĉe privatuloj ktp;
- servoj de vojaĝoficejoj
- organizado de vojaĝo
- sciindaĵoj dum eksterlanda vojaĝo

**13. Nia medio, la naturo**
- pureco kaj prizorgo de nia medio
- minacoj kontraŭ la medio, ĉiutaga mediprotektado: apartiga rubaĵkolektado, energiŝparo, recikligo

**14. La lando de la ekzamenato**
- ĉefaj karakterizaĵoj: situo, grandeco, ĉefurbo, mono, ŝtatformo, parlamento
- klimato, regionoj, urboj kaj turismaj vidindaĵoj
- kelkaj historiaj eventoj
- gravaj festoj kaj kutimoj
- ĉiutaga kulturo: manĝado, trafiko, formoj de la socia vivo ktp.
- kulturaj valoraĵoj

**15. Esperanto-kulturo**
- informiĝi pri kaj per Esperanto: Esperantaj gazetoj kaj periodaĵoj, retejoj kaj diskutlistoj, radio- kaj televidelsendoj (prezenti plurajn tipojn, kompari ilin, doni personan opinion pri iliaj kvalito kaj utiligeblo)
- praktika uzo de Esperanto: korespondado, internaciaj kaj landaj kongresoj, kunvenoj, kunvenejoj, centroj (iliaj rolo kaj graveco), ebloj de faka apliko.
- organiza vivo: prezento de UEA, TEJO, Landa Asocio aŭ alia loka asocio de la ekzamenato kaj prezento de unu faka organizo
- historio de la internacia lingvo: internaciaj lingvoj dum jarcentoj, Ido; ideologiaj karakterizaĵoj de Esperanto (neŭtraleco, kontraŭrasismo, estimo de kulturaj valoroj ktp.)
- historio de la Esperanto-movado: historiaj kaj nunaj simboloj, festoj de la E-komunumo; denaskismo
- Esperanto-literaturo: prezento de kelkaj elstaraj verkistoj/verkoj; kantoj en Esperanto

**Supera nivelo (C1)**

1. **Familio kaj socio**
   - problemoj de la familio kaj geedza kunvivo: havi gefilojn kaj karieron, havi gefilojn kaj ties efiko al la vivnivelo; familia krompago de la ŝtato kaj influo al la nombro de naskiĝoj; ŝtataj infanvartejoj; ĉu frua aŭ malfrua geedziĝo?, sendependeco ene de geedzeco; eksedziĝo kaj konsekvencoj
   - kunvivo de generacioj: ĉu helpo aŭ fonto de konfliktoj?; financa kaj psika apogo por la gejunuloj aŭ kompleta sendependiĝo, frua sendependiĝo
   - maljunuloj en la socio: la prestiĝo de maljuneco; soleco de maljunuloj; ŝtata prizorgo kaj la sistemo de pensio, maljunulejoj.
   - senhejmuloj: socia prizorgo de senhejmuloj; komunuma laboro

2. **Hejmo kaj ĉirkaŭaĵo**
   - loĝejaj bezonoj kaj ebloj: manko de loĝejoj, konstruado de loĝejoj, prezoj, la loko de novaj loĝkvartaloj
   - loĝloko kaj komunumo: infrastrukturo, vojaro, publikaj servoj, medicinaj kaj maljunaĝaj servoj; problemoj pri malnovaj konstruaĵoj, urbopartoj kaj loĝblokaroj: soluliĝo, postrestiĝo-malmoderniĝo
   - la stato de la medio kaj la porkomunuma agado de la magistrato: poluado kaj ĉiutaga protektado de la medio, depono de rubaĵoj kaj nocaj materialoj, la poluado de la aero, akvo kaj grundo respektive ties protekto, la dezirataj evoluigoj kaj civilaj iniciatoj

3. **Laboro kaj ekonomio**
   - faka kariero: la morala kaj financa honoroj de opaj profesioj, karierebloj, intelekta kaj fizika laboro, laŭokazaj laboroj; virinoj en gvidaj pozicioj
   - etentreprenoj kaj multnaciaj entreprenoj; ŝtato kaj entreprenoj; imposto kaj rabatitaj impostoj; prezoj kaj salajroj; nigra laboro
   - ekonomio kaj vivnivelo: bone kaj malpli bone funkciantaj sektoroj, minimuma salajro, riĉuloj kaj malriĉuloj
   - senlaboreco; pluperfektiĝo kaj vivlonga lernado

4. **Lernado kaj edukado**
   - lerneja kaj eksterlerneja edukado: edukado hejme, konsekvencemo, postulemo, donacoj kaj motivado, permesemo kaj severemo; la influo de la lernejo, geamikoj, socio kaj amaskomunikiloj; problemoj de la infanetoj, lernejanoj, adoleskoj
   - profesia orientiĝo: prepariĝo al studoj; la neceso kaj ebloj por modifo de profesia kariero; popularaj kaj malpli popularaj studbranĉoj; pagendaj studoj, stipendio, kromsalajro
   - egalaj ŝancoj: instituciaj aranĝoj favore al egalaj ŝancoj, ebloj de gejunuloj kun sociaj, familiaj aŭ san-malfacilaĵoj; junaĝaj krimuloj
   - subvencioj, stipendioj kaj eksterlandaj studvojaĝoj

5. **Komunikado**
   - la interreto kaj studado, laboro, amuziĝo: ebloj kaj influoj, avantaĝoj kaj danĝeroj; informfluego kaj necesa informiteco
   - lingvokono kaj kariero: efikeco de la lingvolernado en la lernejoj kaj en lingvolernejoj
   - komputiloj sur ĉiu tereno de la vivo: elektronika kontrolo en la laborejoj, protektado de elektronikaj datumoj, interreta aĉetado kaj komputila subskribo
   - letero, portebla telefono kaj interreta mesaĝo: la loko kaj graveco de la malnovaj kaj novaj rimedoj de la komunikado
   - la ebloj de la elformo de propra opinio: informiĝo tra la televido kaj presaĵoj, la influo de la amaskomunikiloj sur la homamaso; kiel gardi sian kritikeman vidmanieron

**6. La privata kaj la publika vivo**

- sociaj danĝeroj: la disvastiĝo de la fumado, alkoholumado, drogado; tipaj kaŭzoj kaj disvolviĝo de la dependeco de alkoholo kaj drogoj, la ebloj de preventado, readaptiĝo, la apogo de la socio kaj de la ĉirkaŭaĵo
- preventado: la respondeco kaj agadsfero de la lernejo, amika rondo, civilaj organizaĵoj, junularaj organizaĵoj, ekleziaj komunumoj; sportado, ludoj, aktiva vivo
- la socio kaj la civitana agado: informiĝo kaj esprimado de opinio pri la laboro de la lokaj administraj instancoj, civilaj organizaĵoj, helpagadoj
- krimo kaj -kontraŭagoj: la rolo de la polico, civilaj gardistoj kaj la ebloj de la individua sindefendo; severeco en la puno, problemoj de la jurisdikcio

**7. Libertempo, amuziĝo, kulturo**

- amaskomunikiloj kaj tradiciaj vojoj de la kulturado: la programproponoj de la televidaj kanaloj, la teatra vivo, kinejaj sukcesoj, la moderna teatro kaj la nuntempa filmarto
- kulturo: enhavo kaj ŝanĝoj de la ĝenerala kulturiteco; kulturaj ebloj en vilaĝoj kaj en urboj
- la kulturo kiel varo: valora kaj senvalora arto, amaskulturo kaj elitkulturo; libroeldonado kaj -disvendado; populareco de kulturaj aranĝoj kaj kulturejoj
- profesiaj kaj amatoraj artistoj: muzikaj grupoj, ĥoroj, trupoj de amatoraj aktoroj kaj dancistoj, subvenciantoj kaj prezentadoj
- muzeoj, belartoj

**8. Sano, sanprotektado, sporto**

- manĝkutimoj, kiel ŝanĝi ilin?: obezeco kaj maldikiga terapio; la kaŭzoj de la malsukceso de maldikigaj terapioj; vegetaranismo; avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la propra nacia kuirarto kompare kun la alinaciaj
- sanitaraj servoj: taŭga rilato inter la malsanuloj kaj kuracistoj, ties kondiĉoj; la perdo de la malsanula sindispono en la sanitara sistemo, dankmono; rilato inter socia situacio kaj sanstato
- medicino, transplantado de organoj: medicinaj kaj etikaj problemoj; procivilizaj malsanoj, rilato kun la nocaĵoj de la medio; konsumado de medikamentoj, prezo de la medikamentoj
- alternativaj metodoj, naturakuracado, naturkuracistoj kaj ĉarlatanoj
- socia asekuro: ŝtataj gratifikaĵoj al familioj, sistemo de pensio; malkresko de la nombro de naskiĝoj, kresko de la nombro de pensiuloj: malkresko de la populacio, kiel influi ĝin
- la situacio de la sporto kaj de la sportistoj en la lando de la ekzamenato, la rolo de la sporto en la vivo, ebloj je sportado; amatora kaj profesia sportado, olimpikoj kaj mondĉampionadoj, popularaj sportbranĉoj

**9. Aĉetado kaj servoj**

- merkato, varprovizado, elekteblo, kvalito; supervendejoj kaj aĉetcentroj, tradicia komerco; la influo de la merkato sur la prezoj kaj oferto; la rolo de la reklamoj; kontrabandaĵoj kaj falsaĵoj
- moncirkulado kaj kreditoj: bankaj servoj, investoj, bankaj kreditoj (por aĉeto kaj renovigo de loĝejoj ktp.) kaj la ĉefaj kondiĉoj, asekuro
- modo kaj komerco: tendencoj, modaj markoj, modo kaj prezoj, modo en la vestado kaj aliterene

**10. Manĝado**

- ĉefaj komponantoj de la nutrado; nutraĵindustriaj, komercaj faciligoj kaj tradicia kuirarto; malsaniga nutrado kaj ties konsekvencoj, malgrasigaj terapioj, vegetaranismo

- manĝ- kaj trinkkutimoj: komparo de naciaj kuirartoj, kutimoj koncerne vinkonsumadon ktp.
- fumado kaj alkoholkonsumado kiel socia problemo; malpermeso de la fumado kaj konsumado de alkoholo; reklamoj pri cigaredoj; fumado en la lernejoj kaj laborejoj

**11. Trafiko**

- trafikmoralo, kontraŭregula konduto: la ofte nekonsiderataj trafikreguloj, laŭlandaj diferencoj en la trafikmoralo; dezirindaj ŝanĝoj por pli efika trafikregulado; sistemo de punpoenttoj kaj monpuno
- akcidentoj kaj iliaj kaŭzoj: ŝoforado sen akcidento, stirado kaj konsumo de alkoholaĵoj – reguloj en diversaj landoj; kion fari okaze de akcidento; ŝoseoj kaj aŭtovojoj
- zorgoj pro aŭtomobilo: kian markon elekti, sekureco; ŝtelo de aŭtomobiloj, kiel preventi ĝin; teknika prizorgo de la aŭtomobilo, riparejoj; parkumado en grandaj urboj
- trafikinvestoj: amastrafiko en urbegoj – metroo aŭ surfaca trafiko; konstruado de vojoj kaj pontoj; konstruado de aŭtoŝoseoj, ilia efiko sur la regionojn; vojimposto

**12. Vojaĝo**

- vojaĝspertoj: enlanda kaj eksterlanda ripozo, ekkono de aliaj kulturoj dum la vojaĝo; vojaĝaj travivaĵoj, belaj rememoroj, moralinstruoj
- akcepti eksterlandajn gastojn: gastigo kaj ĉiĉeronado; gastamo kaj troaĵoj; la nacia kulturo kaj stereotipoj de la turistoj
- interkonatiĝo kaj interamikiĝo kun alilandanoj

**13. Nia medio, la naturo**

- minacoj kontraŭ la natura medio: problemoj de la energifontoj, la protektado de la pura aero, sufiĉa trinkakvo kaj sana grundo; la tuttera varmiĝo resp. klimatŝanĝiĝo, ozona truo kaj ties kaŭzoj; prevento de la tutteraj minacoj
- mondskalaj problemoj: superkresko de la loĝantaro kaj malsato, problemoj de la Tria Mondo kaj ilia traktado en la internaciaj organizaĵoj
- trafiko kaj medio: mediprotektaj kaj energiŝparaj kriterioj dum la trafikplanado; uzo de aŭtomobilo kaj medioprotektado; aŭtovoja aŭ fervoja liverado de varoj

**14. La lando de la ekzamenato**

- karakterizaĵoj de regionoj, de la ĉefurbo, de la loĝloko de la ekzamenato
- homaj rilatoj, atmosfero, sociaj grupoj, politika sistemo, ekonomia situacio, labormoralo
- kulturaj valoraĵoj, tradicioj kaj kutimoj
- minoritatoj kaj minoritataj lingvoj; gravaj historiaj eventoj, historiaj elstaruloj
- evoluinteco de la ekonomio, ekonomiaj rilatoj, la rolo de lando en la monda ekonomio; rilato inter geografia situo kaj ekonomio; evoluinteco de la turismo, pliaj ebloj

**15. Esperanto-kulturo**

- informiĝi kaj informi pri kaj per Esperanto: ĉu varbi por Esperanto, se jes, kiumaniere? Studoj pri kaj en Esperanto. Instruado de la lingvo Esperanto
- praktika uzo de Esperanto: hobia/profesia uzo de Esperanto; karierebloj per Esperanto
- organiza vivo: nuntempaj tendencoj, agadplano de internaciaj kaj lokaj E-organizoj, kunlaboro kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj
- historio de la internacia lingvo: neologismoj, Akademio de Esperanto; ekzemplodonaj lingvouzantoj
- historio de la Esperanto-movado: iamaj kaj nunaj tendencoj; instruoj ĉerpitaj de la pasinta tempo
- Esperanto-literaturo: periodoj de la historio de la Esperanto-literaturo; eldonejoj, bibliotekoj, konkursoj; teatro kaj filmo

# LINGVOKONAJ POSTULOJ

| **Baza nivelo (B1)** | |
|---|---|
| **Morfologio kaj vortsintakso** | |
| Reproduktive | Produktive |
| | Verbaj finaĵoj: -i; -as, -is,- os; -us; -u. |
| | Oftaj modaj helpverboj. |
| | Refleksivaj verboj. |
| | La finaĵoj -o, -a, -e. |
| *estas …e* | |
| | Pluralo. |
| Akuzativo. Malpli oftaj transitivaj verboj. | Akuzativo. Oftaj transitivaj verboj. |
| Akuzativo de tempo (*la tutan tagon*). | |
| Akuzativo de direkto (*iri en la ĉambron*). | |
| Refleksivaj posedaj pronomoj. | Personaj pronomoj (*mi, min, mia*), |
| Ĉiuj tabelvortoj. | Tabelvortoj: demandaj, montraj kaj neaj pronomoj. |
| *tio/la*; *tiu homo* | Uzo de artikolo (*mia libro*). |
| Malpli oftaj prepozicioj. | La plej oftaj prepozicioj; vortordo de prepoziciaj sintagmoj. Prepoziciaj esprimoj (*multe da* ktp.) |
| | La numeraloj (*unu, unua, unue*). |
| | La plej oftaj aŭ-adverboj. |
| | Dato, horo. |
| | Komparativo. |
| Malpli oftaj afiksoj. | La plej oftaj afiksoj. |
| Malpli oftaj sufiksoj. | La plej oftaj sufiksoj. |
| Kunmetitaj vortoj. | |
| **Sintakso** | |
| | Deviga subjekto en la simpla frazo. |
| | Akordo de nomo kaj adjektivo kiel epiteto. |
| | Akordo de nomo kaj pronomo kiel epiteto aŭ predikato. |
| | Neado. (*Mi konas neniun ĉi tie.)* |
| | K- kaj ĉu-demandoj. |
| Rilativa subpropozicio. | |
| Nerekta demando. | Nerekta parolo. |
| | *por …-i* |

| **Meza nivelo (B2)** | |
|---|---|
| **Morfologio kaj vortsintakso** | |
| Reproduktive | Produktive |
| | **Krom la postuloj de la nivelo B1:** |
| | Helpverboj. |
| | *estas …e* |
| | Transitiveco de verboj. |
| Akuzativo de mezurindikaj adjektoj (*cent metrojn longa*). | Akuzativo de tempo (*la tutan tagon*),<br>de direkto (*iri en la ĉambron*). |
| | Refleksivaj posedaj pronomoj. |
| | *tio/la; tiu homo* |
| | La tuta sistemo de la tabelvortoj. |
| | Prepozicioj. |
| | Konjunkcioj. |
| | Afiksoj kaj sufiksoj. |
| | Kunmetitaj vortoj. |
| Malpli oftaj formoj de participoj (ante, ate ktp). | Oftaj formoj de participoj. |
| **Sintakso** | |
| | **Krom la postuloj de la nivelo B1:** |
| | Deviga subjekto en la kompleksa frazo. |
| | Rilativa subpropozicio. |
| | Nerekta demando. |
| Pasivo. | |
| Participaj frazoj. | |

| **Supera nivelo (C1)** | |
|---|---|
| **Morfologio kaj vortsintakso** | |
| | **Krom la postuloj de la niveloj B1 kaj B2:** |
| | Verbaj rekcioj.<br>Transitiveco de verboj. –ig/iĝ. |
| | Akuzativo de mezurindikaj adjektoj<br>(*cent metrojn longa*). |
| | Participoj. |
| **Sintakso** | |
| | **Krom la postuloj de la niveloj B1 kaj B2:** |
| | Pasivo. |
| | Participaj frazoj. |

# PAROLA EKZAMENO
## Ekzameno antaŭ la komisiono

La subaj tekstoj estas kompilitaj laŭ la manlibro de la modela ekzameno, kie oni prezentas korektitajn, parte transformitajn tekstojn de aŭtentikaj ekzamenregistraĵoj.


**Baza nivelo (B1)**

**1. Libera interparolado**

Ekzamenanto: Saluton!
Ekzamenato: Saluton!
- Kiu vi estas?
- Mi estas Fedor Ivanov.
- El kiu lando vi estas?
- Mi venis el Bulgario.
- Ĉu plaĉas al vi la kongreso?.
- Jes. Mi jam partoprenis festivalon en Bulgario, sed tio estas mia unua eksterlanda vojaĝo per Esperanto.
- Ĉu vi venis individue aŭ en grupo?
- Mi venis kun miaj samklubanoj. Ni estas ok personoj el la sama urbo. Nia gvidanto estas esperantisto ekde dudek jaroj, li jam konas multajn homojn ĉi tie.
- Kiel vi alvenis?
- Per aŭtobuseto. Ni vojaĝis dum du tagoj, ni haltis en hoteleto por dormi. Ni ĉiuj ŝoforis unu post la alia, kaj tiel ni povis rapide alveni.
- Kio plaĉas al vi dum la kongreso?
- Mi ŝatis la interkonan vesperon, la nacian vesperon kaj tion, ke oni povas libere paroli kun homoj, kiuj venis el diversaj landoj.
- Kie vi vivas: en granda urbo aŭ en malgranda vilaĝo?
- Mi loĝas en mezgranda urbo, kiu havas 35 mil loĝantojn. Ĝi troviĝas 80 kilometrojn okcidente de la ĉefurbo.
- Ĉu vi loĝas en domo aŭ en loĝejo?
- Mi loĝas en loĝejo de malgranda konstruaĵo, kie troviĝas ses loĝejoj. Estas ĝardeno ĉirkaŭ la domo. Estas en ĝi gazono kaj kelkaj floroj. Estas en ĝi ankaŭ benko por ripozi. Sed sur la plej granda parto de la korto estas betono, ĉar la loĝantoj volas parki ie siajn aŭtomobilojn. Ni ne havas garaĝon. Estas entute tri etaĝoj kaj du loĝejoj sur ĉiu etaĝo. Mi loĝas en la teretaĝo.
- Ĉu vi havas dorlotbestojn?
- Ne. Mi ne ŝatus havi bestojn en la loĝejo, krom eble tute malgrandajn kiel birdoj aŭ fiŝetoj, kiujn mi tre ŝatas rigardi tra la akvario. Mi tre ŝatas hundojn, sed mi ne volas hundon, ĉar mi ne havus tempon promenigi ĝin.
- Kaj kion ĝi farus dum vi vojaĝas, ĉu ne?
- Jes, ĝuste.

## 2. Memstara prezento de temo



Ekzamenato: Tio estas mia ŝatata temo. Manĝaĵoj! Mi ŝatas manĝi, kaj ne nur manĝi, sed ankaŭ kuiri. En la studenthejmo ĉiu scias, kiu estas Katja. La bona kuiristino! Se mi ne studas, mi estas en la kuirejo. Mi tre ŝatas kuiri. Sur la unua bildo estas viandaĵo, eble kokidaĵo kun rizo. Sur la dua bildo, la viro kuiras legomojn. Eble tio estos ĉina specialaĵo. Ne, ĉar la viando estas tro granda por tio.
Ekzamenanto: Kiaj legomoj estas en la unua plado?
- Io ruĝa, eble tomato aŭ kapsiko. Kaj io verda, eble petroselo. La viro verŝajne ne estas kuiristo, ĉar malantaŭ li videblas hejma kuireja meblo. En mia lando viroj ne kutimas kuiri, tio estas laboro por virinoj.
- En la studenthejmo kiajn manĝaĵojn vi kutimas kuiri? Ĉu specialaĵojn aŭ ion ajn?
- Ion ajn, sed nur ne tro komplikajn. Mi estas iom mallaborema, kaj mi devas multe studi. Ekzemple mi ne ŝatas prepari terpomaĵon. Mi preferas rizon aŭ pastaĵon, tio estas pli rapide farebla.

**3. Situacia ludo**

*La tasko: Via eksterlanda gasto (la ekzamenanto) volas aĉeti donacon por sia patrino. Li/ŝi petas vian helpon.*

Ekzamenanto: Kara, mi havas problemon.
Ekzamenato: Ĉu mi povas helpi al vi?
- Mi ŝatus aĉeti donacon al mia patrino, kaj mi ne scias kion kaj kie mi aĉetu.
- Ĉu vi pensis pri juvelo aŭ parfumo?
- Ne, ne. Tio estus tro multekosta! Sed mi ŝatus iun lokan specialaĵon.
- Ni havas famajn kaj tre bongustajn bombonojn.
- Tio estas bona ideo. Kie mi povas aĉeti ilin?
- Estas specialaj vendejoj. Ekzemple en la ĉefplaco, ĉe la katedralo. Vi povas elekti el belaj pretaj pakaĵetoj aŭ peti kelkajn bombonojn laŭ via plaĉo.
- Bonege. Sed mi ŝatus ankaŭ ion, kio daŭros, kion oni ne manĝas. Ĉu vi povus proponi ion?
- Estas tre belaj potoj en nia regiono. Mi konas potiston, kiu preparas mirindajn vazojn kaj ujojn.
- Ĉu ne tro multekoste?
- Estas diversaj prezoj, certe vi trovos taŭgan por via monujo.
- Kie troviĝas tiu vendejo?
- Tute proksime, en la dua strato apud la katedralo, dekstre. Se vi volas, mi akompanos vin.
- Dankon, estus bone. Sed nur se tio ne estas ĝena por vi.
- Tute ne, mi ĉiam ŝatas rigardi tie la novajn potaĵojn. Kiam ni iru? Ĉu tuj?
- Jes, ni povas iri tuj.

**Meza nivelo (B2)**


**1. Libera interparolado**

Ekzamenanto: Saluton!
Ekzamenato: Saluton!
- Ĉu mi povas vidi vian pasporton aŭ legitimilon?
- Bonvolu.
- Dankon.
- Kiel vi nomiĝas?
- Mi estas Olga Benderovskaja.
- El kiu urbo vi venis?
- El Sankt-Peterburgo.
- Ekde kiom da tempo vi estas en Hungario?
- Antaŭ unu jaro kaj duono mi jam vivis ĉi tie, kaj nun mi revenis por verki mian diplomlaboraĵon.
- Ĉu vi diplomiĝos en Hungario?
- Ne, mi studas en Sankt-Peterburgo, post Kristnasko mi reiros tien, kaj diplomiĝos tie.
- Do vi venis nur por verki vian diplomlaboraĵon.
- Jes, sed verŝajne mi finos ĝin en Sankt-Peterburgo.
- Vi reiros antaŭ kiu Kristnasko, antaŭ la hungaria aŭ rusa?
- Post la hungaria, sed antaŭ la novjaro, ĉar tiam mi kutimas festi kun mia familio.
- Kristnaskon oni ne festas samtempe en Hungario kaj en Rusio.
- Jes, jes, mi scias.
- Kiaj diferencoj estas inter la festkutimoj ĉi tie kaj en Rusio?
- Mi neniam festis Kristnaskon en Hungario, do mi neniun ideon havas pri tio.
- Do, rakontu al ni, kiel festas Kristnaskon rusoj!
- Fakte, oni festas novjaron, tio estas la ĉefa festo ĉe ni. Sed lastatempe oni atentas ankaŭ pri Kristnasko, oni iras en preĝejon, poste oni invitas la familianojn aŭ geamikojn manĝi kune.
- En Hungario Kristnasko estas neimagebla sen ornamita kristnaskarbo. Ĉu ekzistas tiu kutimo ankaŭ en Rusio?
- Kompreneble. Mi pensas, ke en ĉiu lando ekzistas tiu kutimo, ke oni ornamas arbon.
- Kiuj estas la tipaj donacoj?
- Laŭ mi tio dependas de tio, kiun rilaton oni havas kun la persono, al kiu oni volas doni donacon. Ni donacas ĉiuspecajn bagatelaĵojn, sed dependas ĉefe de nia rilato, kiun donacon ni donas.
- En unu komponanto certe estas diferenco, nome en la manĝkutimoj. Kion manĝas rusoj Kristnaske?
- Iun torton, dolĉaĵojn kaj ian viandon. Kaj salaton. Laŭ mi tio estas tipe rusa. Estas salato, ĝia nomo estas rusa salato. Sed evidentiĝis, ke ĝi estas ne rusa salato, oni importis ĝin el Francio. Estas kutimo manĝi tiun salaton.
- Ni konas unuspecan rusan salaton, la rusan viandsalaton. Mi ne scias, ĉu tio ekzistas en Rusio…
- Laŭ mi temas ĝuste pri tio.
- Kaj ĉu oni manĝas tion Kristnaske?
- Jes.
- Do tio estas vera diferenco. En Hungario Kristnaske oni certe ne manĝas rusan viandsalaton. Kiel vi venis al Hungario, per kia trafikilo?
- Per trajno. Estis terura mia vojaĝo, ĉar mi devis ŝanĝi trajnon trifoje.
- Ĉu ne estus pli komforte veni per aviadilo?
- Estus pli komforte, sed mi havas malabundajn financajn eblojn.

- Ĉu la trajno estas tiugrade malplikosta? Mi pensis, ke por tia distanco ĝi ne estas pli favora ol aviadilo.
- Ĝi estis pli malmultekosta, multe malpli.
- Dankon, ni daŭrigu per la temo de bildoj.

## 2. Memstara prezento de temo





Ekzamenato: Se mi bone vidas, ambaŭ bildoj prezentas vendoplacon. Sur la unua estas subĉiela legomvendejo en urbego, ĉar fone videblas grandaj, novaj konstruaĵoj. Ankaŭ la alia estas vendoplaco, sed tie oni vendas fiŝojn. Mi tre ŝatas la fiŝ-standojn, kie oni vendas diversajn mar-delikataĵojn, kaj oni povas eĉ gustumi ilin. En tiuj vendoplacoj oni povas aĉeti la plej diversajn fiŝojn, marfiŝojn kaj krabojn, krome polpojn kaj mitulojn. Sur la alia vendoplaco vendiĝas legomoj: karoto, florbrasiko, poreo, kaj ankaŭ fruktoj, malantaŭe estas banano kaj pomo. Laŭ mi estas printempo, ne nur pro la legomoj, sed mi rimarkis, ke la homoj surhavas ne somerajn, sed eble printempajn aŭ aŭtunajn vestojn. Estas laŭ mi pli verŝajne printempo.

Ekzamenanto: Ĉu vi kutimas aĉeti en vendoplacoj?

- Jes. Estas pli bone aĉetadi en vendoplaco ol en supervendejo. Tie estas pli freŝaj la fruktoj kaj legomoj, kaj tie eblas aĉeti ankaŭ senpere de la kamparanoj. Ne nur fruktojn kaj legomojn, sed ekzemple viandon, ovojn, mielon, eĉ florojn.
- Kiam vi kutimas iri al vendoplaco?
- Ĝenerale sabate, antaŭtagmeze. Estas ĉiam multege da homoj.
- Ĉu la unua bildo prezentas tian vendoplacon?
- Ne. Tiu vendoplaco estas praktike malplena, neniu estas tie. Mi ne vidas horloĝon, sed eble estas tagmeze, kaj la vendistoj iris tagmanĝi.
- Ĉu ili lasis tie la amason da karotoj, bananoj, fruktoj? Ili simple foriris?
- Tio eblas en Oslo, kaj ĉie en Norvegio.
- Ĉu?
- Jes. Antaŭ la domoj staras tabletoj kun iu frukto aŭ legomo. Apude estas vazo aŭ skatolo kaj papero kun la prezoj. Neniu estas tie, kaj se mi volas aĉeti kilogramon da io, mi ĵetas la monon en la ujon, prenas la varon kaj foriras.

### 3. Situacia ludo

*Tasko: Vi partoprenas organizitan vojaĝon al fama feriloko, sed nek la loĝigo, nek la restoracio konformas kun la priskriboj de la prospekto. Plendu al la gvidanto (ekz. mankas klimatizado, malbongustas la pladoj ktp.)! Serĉu iun solvon!*

Ekzamenanto: Saluton, sinjorino! Ĉu mi povas helpi al vi?
Ekzamenato: Saluton! Mi ege esperas, ke vi povas, ĉar mi havas seriozajn problemojn.

- Kio estas via problemo?
- La hotelo kaj la restoracio ĉi tie ne estas tiaj, kiajn la prospekto promesis.
- Kio estis en la prospekto?
- Unue, ke la hotelo havas naĝejon. Kie ĝi estas? Ĝi simple ne ekzistas! Due, oni skribas, ke el la balkono de la ĉambro estas videbla la maro, sed mi vidas nur betonaĵojn. Krome la ĉambro estas malpura, kaj ne funkcias la krano. Ne estas varma akvo en la banĉambro.
- Ĉu vi parolis jam pri tiuj mankoj ĉe la akceptejo de la hotelo? La krano ja iam ajn povas malboniĝi…
- Jes, mi jam plendis. Oni promesis riparigi ĝin, sed…
- … sed nenio okazis?
- Ĝuste, tiel.
- Vidu, vi aĉetis sufiĉe malmultkostan formulon…
- Fakte, sed se ĉio diferencas de la prospekto, tiam mi malkontentas. Kial mi devus akcepti tion?
- Mi povas helpi al vi, kaj certigi pli kvalitan ĉambron, se vi pretas krompagi iomete.
- Vere estas strange, kial mi devus krompagi?! En la prospekto oni promesis klimatizadon en la ĉambro. Tio tamen mankas. En tiu varmego!
- Jes, fakte. Do eble mi povus helpi tiel, ke mi parolos kun la hotelisto kaj demandos, ĉu ili havas pli bonan liberan ĉambron.
- Estus bone. Sed estas ankoraŭ io. Ankaŭ la restoracio estas malkonvena. Imagu, hieraŭ la viando estis duonkuirita!
- En tio mi bedaŭrinde ne povas helpi, la manĝado ne estas en la formulo. Se la restoracio de la hotelo ne taŭgas al vi, vi povas provi aliajn en la ĉirkaŭaĵo, mi certas, ke vi trovos ion, kio plaĉos al vi. Sed la problemon pri la ĉambro mi provos aranĝi.
- Dankon, mi tre ĝojas.
- Ankaŭ mi dankas vin, kaj mi petas pardonon pro la malagrablaĵoj.

**Supera nivelo (C1)**

**1. Libera interparolado**

Ekzamenanto: Bonan tagon!
Ekzamenato: Saluton!

- Vian identigilon bonvolu!
- Jen mia pasporto.
- Ĉu vi venis el Usono? De kie pli precize?
- De Kalifornio, mi loĝas proksime al Los Angeles.
- Ĉu vi estas la unuan fojon en Eŭropo?
- Ne, mi estis jam ĉi tie plurfoje. Ankaŭ infanaĝe, kaj nun mi vivas ekde iom da tempo en Germanio.
- Do, tiel vi konas Eŭropon. Kiom diferencas laŭ vi la kalifornia kaj la germana vivstiloj?
- Kalifornia vivstilo… Interesa demando. Unue mi dirus, ke multe gravas la vetero, ĝi havas grandan influon. En Kalifornio estas multe da sunbrilo, estas pli varme kaj pro tio la homoj estas pli gajaj, pli malstreĉaj. Mi ne volas diri per tio, ke ĉi tie la homoj estas malgajaj, sed aliaj, iom pli seriozaj, iom pli pesimistaj, sed tamen tre afablaj. Alia diferenco estas, ke en Kalifornio estas pli rapida la vivo ol ĉi tie. Do ĉi tie malgraŭ la pli malbona humoro, la homoj estas pli trankvilaj ol en Usono. Sed estas relative, kion oni nomas trankvila.
- Eŭropanoj emas pensi, ke en Usono se iu estas nervoza, tiu rapide ekuzas sian pistolon. Ĉu vere? Kia estas la publika sekureco?
- Ĝi estas tre malbona, vere tre-tre malbona. Fakte eĉ en sia aŭtomobilo oni ne estas sekura. Kiam mi venis en Eŭropon, hejme estis la kutimo, ke iuj per pistolo devigis la ŝoforojn transdoni la aŭtomobilon al la banditoj. Vi devas do forte atenti, en kiu kvartalo vi ŝoforas. Estis diversaj konsiloj, kion fari por eviti tiajn situaciojn. Ekzemple prefere veturu en pli trafikplenaj stratoj. Mi konas iun, al kiu oni perforte forprenis la aŭtomobilon, eĉ pafvundis lin. Feliĉe, lia stato ne estis tro grava, li devis pasigi kelkajn semajnojn en hospitalo, sed li transvivis la aventuron.
- Estas konate, ke en Kalifornio ofte ekestas pereigaj tertremoj. Estas danĝere vivi tie, ja iam ajn oni povas suferi grandegan tertremon, kiel tio okazis en Los Angeles.
- Jes, jes, fakte estas tiel. Ĝuste unu semajnon antaŭ mia forveturo okazis tertremo. Mi ne estis hejme, sed mia patrino kaj frateto sentis ĝin. Bonŝance ili ne vundiĝis, sed la domo difektiĝis. Jes, tiu danĝero ĉiam aktualas en Kalifornio. Kaj pro tio la prezo de la domoj malaltiĝis, ĉar multaj volas alilokiĝi.
- Ĉu estas eble protekti sin kontraŭ la tertremo?
- Certagrade tio eblas, estas diversaj konsiloj. Ekzemple, se oni estas hejme, oni kaŝiĝu sub la tablo, kaŭru aŭ ne precize kaŭri, mi ne scias kiel diri, kiel infaneto…
- Ĉu buliĝi?
- Jes. Buliĝi. Oni devas meti la manojn ĉe la nuko, por protekti la kapon, por ke ĝin ne trafu io, se moviĝas la tablo super la kapo. Ankaŭ tio estas bona solvo, ke oni staru sub la kadro de pordo, se estas pordo tie, ĉar ĝi estas la plej stabila. De tie nenio povas fali, krome la kadro estas pli firma, ol se oni starus ĉe la muro, ĉar la muro povas ruiniĝi, sed la kadro ĝenerale estas fiksita.
- Dankon, ni pluiru al la dua parto de la ekzameno. Bonvolu paroli pri la temo de tiuj bildoj!

**2. Memstara prezento de temo**









Ekzamenato: Tiuj bildoj ligiĝas al la sporto. Ni povas paroli pri sportado por propra plezuro, por gardi sin en bona formo aŭ pri konkursnivela sportado. Nuntempe ĉiu konscias pri tio, ke por konservi nian sanon, estas tre grava la sportado. Ankaŭ en mia lando estas tre populara la biciklado. Multaj bicikle cirkulas en la urboj, inter la hejmo kaj laborloko. Mi pensas, ke tio estas iom danĝera, ĉar ekzemple en nia ĉefurbo mankas vojoj por biciklantoj, kaj inter la aŭtomobiloj estas vere danĝere bicikli. Multaj kredas protekti sin per kasko, kiel sur la bildo. Mi legis ie, ke kasko utilas nur en kelkaj specialaj okazoj. Mi mem ne uzas kaskon, ĉar ĝi ĝenas min, mi ne aŭdas bone, ĝi premas mian kapon.

Cetere, sur la bildo la du biciklantoj ekskursas, videblas pakaĵo malantaŭ la viro. Ili eble faras unu- aŭ du-tagan ekskurson, trankvile en bela ĉirkaŭaĵo.

Alitipa konkero de la naturo videblas sur la lasta bildo, kiam oni progresas ne horizontale, sed grimpas ĉiam pli alten. Mi kompatas la patrinon de tiu knabo, ĉar li riskas vere tro por havi la plezuron de alpismo. Kvankam mia konato, kiu praktikas la saman sporton, ĉiam diras, ke ĝi ne estas pli danĝera ol iu ajn alia sporto. Oni devas havi kompreneble bonan fizikan staton, forton en la muskoloj, bonan intelekton por plani la paŝojn, koni sin mem, konscii pri siaj kapabloj. Gravas ankaŭ la taŭga ekipaĵo – ŝnuroj, krampoj ktp. –, kaj helpo de spertaj kuntaĉmentanoj. Do tiu sporto estas nur ŝajne individua sporto.

La dua kaj tria bildoj aludas la konkursan aspekton de sportado. Al la natura emo je korpa bonfarto dank' al fortostreĉo aldoniĝas la eble same natura emo je elstariĝo, je venko. Olimpiaj medaloj povas fierigi la tutan nacion, same ĉampionado de futbalo vekas emociegojn en la zelotoj. Per konkursa sportado la sportistoj ĝenerale ne plu utilas al sia sano, tute male…

### 3. Situacia ludo

*Tasko: Via konato (la ekzamenanto) ĝis nun neniam vizitis operejon, li/ŝi eĉ ne ŝatus viziti ĝin, ĉar li/ŝi aŭdis pri ĝi nur malbonaĵojn. Vi mem ŝatas ĝin, laŭ vi ĝi estas bona amuzejo kaj vi ege deziras, ke li/ŝi akompanu vin almenaŭ unufoje. Malgraŭ ĉiuj protestoj konvinku lin/ŝin rigardi unu spektaklon tie!*

Ekzamenanto: Ĉu vi planis iun programon por la semajno? Pri kio vi pensis?
Ekzamenato: Ĉu vi estis jam en la Operejo?

- Por esti sincera, neniam. Sed mi esperas, ke vi ne volas inviti min al Operejo?
- Se vi emus veni, mi volonte montrus al via nian mondfaman Operejon, ĉar ĝi estas vere admirinda, krome nuntempe oni prezentas bonegajn spektaklojn.
- Laŭ mi la ĝenro de opero komplete eksmodiĝis.
- Ĉu? Mi miras aŭdi tion de vi. Ĉu vin tiom interesas esti laŭmoda?
- Multaj miaj konatoj opinias neelteneblaj la operojn. Unu el miaj konatoj, kiam li spektis operon, dormiĝis dum la unua akto, estis tiom malinteresa la prezentado.
- Tio okazis tiel, ĉar li ne kun mi iris tien. Vi vidos, mi elektos por vi bonan spektaklon.
- Pri kio vi pensis?
- Unue mi devas trastudi la programon, mi decidos poste. Mi elektos ion tre-tre bonan.
- Ĉu ne estos tro longa la spektaklo?
- Kiom longan vi eltenus?
- Ĝi nepre ne estu pli longa ol du horojn kaj duonon, kun la paŭzo.
- Aŭskultu, unu el miaj studentoj laboras en la Operejo, li persone elektos por ni iun bonegan spektaklon. Kaj ĝi kostos neniom, ĉar li lasos nin eniri tra malantaŭa pordo.
- Bonege.
- Simple ne eblas rifuzi tiom bonan proponon.
- En ordo. Sed mi insistas, ke se ĝi ne plaĉos al mi, mi foriros dum la paŭzo.
- Bone. Mi diros al mia konato, ke mi iros kun novulo, kaj petos lin elekti iun ekscitan verkon. Kaj dum la interakto mi regalos vin per bakaĵoj en la bufedo.
- Konsentite, vi konvinkis min.

## 4. Tekstokomentado

*Tasko: Legu la suban tekston kaj prezentu vian starpunkton pri la legitaĵoj!*

*Fine ni devas difini kio estas* **Eŭropo kaj eŭropaj lingvoj**. *[…] En tiu artikolo […] Eŭropo egalas al la membro-ŝtatoj de la Konsilio de Eŭropo. Ĉiuj lingvoj parolataj de la homoj naskiĝintaj en tiuj landoj estas konsiderataj eŭropaj lingvoj. Temas pri la gepatraj lingvoj kaj de indiĝenaj kaj praloĝantaj popoloj kaj de la enmigrintaj aŭ rifuĝintaj minoritatoj. Ni precizigu, ke enlistiĝas ankaŭ la signolingvoj kaj la artefaritaj lingvoj, kiuj, kiel Esperanto, estas gepatraj lingvoj por kelkaj.*

*(Tove Skutnabb-Kangas: Kial konservi kaj favori la lingvan diversecon en Eŭropo? Konsilio de Eŭropo, 2003)*

La fonto de tiu teksto estas eldonaĵo de Konsilio de Eŭropo. Mi mem estas aziano, do mi ne konas la eŭropan strukturon.
La verkinto parolas pri eŭropaj lingvoj, difinas, kio estas eŭropa lingvo. Estas interese, ke ŝi diferencigas indiĝenajn kaj praloĝantajn popolojn, verŝajne temas pri tempe diversaj vivuloj. Ekzemple mia edzino estas bretono, do indiĝeno en Francio kaj ankaŭ praloĝanto, kompare kun enmigrintoj de la dudeka jarcento, ekzemple.
Inter migrado kaj rifuĝo estas klara la diferenco: la kaŭzo de forlaso de la naskiĝlando.
Laŭ la aŭtoro egalas, ĉu iu lingvo estas historie eŭropdevena aŭ ne, ĉu ĝi estas minoritata lingvo aŭ ne. Li estas tre permesema koncerne la signolingvojn kaj artefaritajn lingvojn, kiel Esperanto. Li mencias eĉ la ekziston de denaskuloj.
Laŭ mi estas tre grave, ke ankaŭ neesperantistoj konsideru Esperanton lingvo. Mi legis iam, ke ekzemple hungaraj esperantistoj longe luktis, ke lingvistoj, eĉ la akademio, se mi ne eraras, deklaru, ke Esperanto, kvankam artefarita, estas viva lingvo, kun propra kulturo. En Esperantio mem ĉiam okazadas diskutoj pri la ecoj de tiu kulturo, pri la komunumo de esperantistoj mem. Estas kelkaj, kiuj volus agnoskigi esperantistojn minoritatoj, aliaj preferus vidi ilin en politika partio.
Por mi tiuj klopodoj ne estas tro interesaj. Mi mem volas simple uzi tiun miraklan lingvon, kiu estas mia familia lingvo. Mi klopodas bone regi ĝin (tial mi faras tiun ĉi ekzamenon, por vidi, kiugrade mi regas ĝin). Mi partoprenas renkontiĝojn, ankaŭ mi mem kunorganizas kelkajn, mi aĉetas librojn, kunlaboras en esperantlingva vikipedio, mi verkas librojn esperantlingve pri mia faktereno, kaj mi transdonas la lingvon al niaj gefiloj.
Do ankaŭ por mi, kiel patro de denaskuloj, tiu teksto estas valora dokumento. Mi volonte legus la tutan verkon, ĉar ankaŭ laŭ mi gravas konservi la lingvan diversecon de la mondo.

**Aŭda kompreno de sonregistraĵo**

ELTE ORIGÓ NYELVI CENTRUM

**Baza nivelo (B1)**
E1_B1_LAB_6

**Aŭda kompreno**

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo estas: 8 poentoj**

**Aŭskultu la tekstojn kaj solvu la subajn taskojn!**

**I.1. Aŭskultu la unuan tekston kaj surbaze de la dialogo kompletigu la frazojn.**
**0 estas ekzemplo por vi.** **Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi tasko: 8**
**Sondosiero: http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/41852870**

0. *La du personoj konversacias antaŭ* ekzameno.
1. Por ekzameniĝi venis la ______.
2. La ekzameno komenĉiĝos post ______.
3. La sinjoro jam havas informojn pri la vigla hungara esperantista ______ vivo
4. kaj pri la eminentaj hungaraj ______.
5. La sinjoro volas aŭdi per ______ pri la lingvonivelo de la hungaroj.
6. La hungarlanda diplomo havas grandan prestiĝon ______.
7. La sinjorino nenion sciis pri ______.
8. La konversacio finiĝis, ĉar ______.

**I.2. Surbaze de la unua teksto decidu ĉu la asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M).**
**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi tasko: 4**

| | V | M |
|---|---|---|
| 1. La Budapeŝta Skolo estas fama. | | |
| 2. La hungaraj lingvistoj estas tre bonaj. | | |
| 3. Ekzameniĝas homoj el diversaj landoj. | | |
| 4. La sinjoro venis el Germanio. | | |
| 5. La sinjoro ne volas ekzameniĝi. | | |
| 6. En Budapeŝto loĝas la plej multe da diplomitaj instruistoj. | | |
| 7. La sinjorino korespondas kun hungaroj. | | |
| 8. "Zamenhof" signifas "sem-korto". | | |

**II .1. Aŭskultu la rakonton kaj respondu la subajn demandojn.**
**0 estas ekzemplo por vi.**

**Maksimumo de la akireblaj poentoj en tiu ĉi tasko: 8**

0. *Kiel nomiĝas la junulino?*

   Ŝia nomo estas Lola.

1. Kiom aĝa estas Lola?

   ______________________________

2. Kia estis la vendistino en la butiko?

   ______________________________

3. Kian specialan materialon enhavis la kuko, kiun Lola mendis?

   ______________________________

4. Al kio similu la kuko de Lola?

   ______________________________

5. Kio mankis el la surskribo, kiam Lola la unuan fojon ekvidis ĝin?

   ______________________________

6. Maksimume kiom da minutoj havis la vendistino por korekti la eraron?

   ______________________________

7. Kiom da fojoj Lola eniris la vendejon?

   ______________________________

8. Kial ne devis la virino enpaki la kukon?

   ______________________________

ELTE ORIGÓ NYELVI CENTRUM

**Meza nivelo (B2)**
E1_B2_LAB_4

**Aŭda kompreno**

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 25**
**Atingenda minimumo estas: 10 poentoj**

**Aŭskultu la tekstojn kaj solvu la subajn taskojn!**

**I.1. Aŭskultu la unuan tekston kaj decidu, ĉu la subaj asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M)!** **Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 13**

Sondosiero: http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/41852932

| | V | M |
|---|---|---|
| 1. Bona Espero estas privata Esperanto-lernejo en Brazilo. | | |
| 2. La instruistojn de Bona Espero pagas la registaro. | | |
| 3. En Bona Espero la lernantoj post la lecionoj reiras al la familio. | | |
| 4. En Bona Espero la pedagogoj estas kun la infanoj ankaŭ post la lecionoj. | | |
| 5. La urbaj infanoj hejme ofte ne ricevas bonan edukon. | | |
| 6. En la urbaj lernejoj estas malpli da lecionoj ol en Bona Espero. | | |
| 7. Post la reformoj en Bona Espero oni devis funkciigi 9 klasojn. | | |
| 8. Nun la antaŭlerneja klaso estas la unua klaso de la lernejsistemo. | | |
| 9. Giuseppe kaj Ursula staras ĉiam je la dispono de la infanoj. | | |
| 10. Bona Espero, pro financaj kialoj, povas havi maksimume 30 infanojn. | | |
| 11. La registaro donas tage unu bulketon por ĉiu infano. | | |
| 12. Bona Espero ne bezonas pagi la konsumitan kurenton. | | |
| 13. Bona Espero funkcias per la subteno de esperantistoj. | | |

**II. Aŭskultu la duan teskton kaj solvu la subajn taskojn!**
**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 12**

**II.1. Aŭskultu la rakonton de Sadi pri fanfarona vojaĝanto kaj trovu <u>kiu varo el kiu lando devenas</u>. (4 poentoj)**

porcelano el ____________________.

brokantaĵoj el ____________________

ŝtalo el ____________________ .

teksaĵo el ____________________ .

**II.2. Respondu la subajn demandojn skribante <u>plenan</u> frazon. (8 poentoj)**

1. Kiun profesion havis la persono, kiun Sadi renkontis?

____________________________________________

2. Kiom da bestoj havis la viro, kiun renkontis Sadi?

____________________________________________

3. Kial volas iri al Aleksandrio la parolpartnero de Sadi?

____________________________________________

4. Kion faros la viro post sia lasta vojaĝo?

____________________________________________

**Supera nivelo (C1)**
E1_C1_LAB_2

**Aŭda kompreno**

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 30**
**Atingenda minimumo estas: 12 poentoj**

**I. Aŭskultu la tekston kaj solvu la subajn taskojn!**
**Maksimume akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 22**

**I.1. Aŭskultu la tekston pri subtera medioprotektado kaj decidu ĉu la subaj asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M)! Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 10**

**Sondosiero:** http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/41852960

| | V | M |
|---|---|---|
| 1. La entrepreno deponas solidajn kaj likvajn rubaĵojn. | | |
| 2. Ili zorgas pri limigo de akvopoluciado. | | |
| 3. Oni ekuzas malnovajn minejojn por rubaĵdepono. | | |
| 4. La rubamaso kreskas, ĉar la industrio produktas ankaŭ kloakakvon. | | |
| 5. La entrepreno FTV ne okupiĝas pri toksaj rubaĵoj. | | |
| 6. Ekzistas reto de deponejoj por la radioaktivaj rubaĵoj. | | |
| 7. Ĉiuj lokaj rubejoj funkcias per konvena depon-teknologio. | | |
| 8. La bareloj difektiĝis pro bruligo. | | |
| 9. La putoj ne estos uzeblaj dum longa tempo. | | |
| 10. La entrepreno pri geodezio kaj grundekzamenado repurigos la poluciitan akvon. | | |

**I.2. Plenigu la tabelon laŭ la sama teksto! (12 poentoj)**

| | |
|---|---|
| 1. La kreskantan rubamason oni deponas en rubejoj kune kun | |
| 2. Al aparte manipulata deponejo alvenas | |
| 3. Ĉe rubejoj kun malkonvena teknologio oni devas kalkuli je | |
| 4. Norde de la ĉefurbo okazis | |
| 5. La homoj ne fariĝis viktimoj, ĉar | |
| 6. Oni ŝanĝos la poluciitan grundon | |

**II. Aŭskultu la duan tekston kaj metu X-on en la kestetojn, se la informo estas ĝusta.**
**Maksimume akireblaj poentoj en tiu ĉi parto: 8**

**Kion oni ellernas dum adoptado de *politesse* en Francio?**

| | jes |
|---|---|
| bele surmeti la tablon | |
| kiel uzi la manĝilojn | |
| kiel uzi la buŝtukon | |
| kiel fiksi la kolumon | |
| manĝi malrapide | |
| vesti sin kiel artisto | |
| ĝui arton, desegnaĵojn, kantojn | |
| skribi afablajn leterojn | |
| respekti aliajn | |
| atenti sentojn kaj emociojn de la aliaj | |
| regulojn de komuna vivado | |
| plibeligi la ĉirkaŭaĵon | |
| kiel stiri aŭton | |
| observi trafikregulojn | |
| fari specialajn gestojn | |
| esti tolerema | |

# SKRIBA EKZAMENO

ELTE ORIGÓ NYELVI CENTRUM

**Baza nivelo (B1)**
E1_B1_IRA_2

## I. Lingvokonaj taskoj

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 10**
**Proponita labortempo: 30 minutoj**

**Solvu la subajn taskojn!**

1. **Enskribu la akuzativon (-n) tie, kie ĝi mankas.**
**(Akireblaj estas 2,5 poentoj, vi ricevos ¼ poenton por la bona solvo, sed perdas ĝin se vi eraras.)**

Ekzemplo: Mi ŝatas banano_n_ .

Mi aĉetis unu kilogramo_____ da banano_____. Hodiaŭ mi kunprenis 3 el ili____ al mia laborejo. Tagmeze mi manĝis du_____. La alia______ manĝos mia_____ kolegino_____ posttagmeze. Ŝi kunportis pomo_____, sed preferas mia______ banano______ .

2. **Starigu demandojn pri la substrekitaj frazopartoj. (2,5 poentoj)**

Ekzemplo: Hieraŭ mi <u>aĉetis</u> ĉokoladojn por mia filo.

<u>Kion vi faris hieraŭ?</u>

1. Maria somerumis <u>en la montaro</u>.

________________________________________

2. Ŝi estas <u>biologo</u>.

________________________________________

3. Maria laboras en la universitato <u>de 1995</u>.

________________________________________

4. Ŝia filino vestas sin ĉiam tre <u>elegante</u>.

________________________________________

5. Petro vidas <u>ilin</u> ĉiumatene.

________________________________________

**3. Elektu la ĝustan solvon el ĉiuj kvar frazoj!**
**Vian solvon skribu en la suban tabelon. (5 poentoj)**
0 estas ekzemplo por vi.

**0.** **A** : Mi nomas Stefano. **B** : Mia nomo estas Stefano.
**C** : Mi nomiĝas min Stefano. **D :** Mi nomas Stefanon.

1. **A** : La leciono finos je la oka horoj. **B** : La leciono finiĝos je la okan horon
**C** : La leciono finos je la oka horo. **D :** La leciono finiĝos je la oka horo.

*2.* ***A*** *: La supo mi manĝas kun kulero.* ***B*** *: La supon mi manĝas per kulero.*
***C*** *: Mi manĝas la supon kun kulero.* ***D*** *: Mi manĝas la supo per kulero.*

3. **A** : Kiu tago estas hodiaŭ ? Bona. **B** : Kia tago estas hodiaŭ ? Lundo.
**C:** Kiu tago estos hieraŭ ? Dimanĉo. **D**: Kiu tago estis hieraŭ? Sabato.

*4.* ***A :*** *Mi estas pli aĝa ol mia fratineto.* ***B :*** *Mi estas pli aĝa ol la mia fratineto.*
***B*** *: Mi estas pli aĝa kiel mia fratineto.* ***D*** *: Mi estas pli aĝa ke mia fratineto.*

5. **A** : Bopatro estas patro de mia edzo. **B** : Bopatro estas patro de mia patrino.
**C :** Bopatro estas filo de mia patro. **D** : Bopatro estas patro de la bopatrino.

*6.* ***A*** *: Ŝi naskiĝis la 15-a de decembro.* ***B*** *: Ŝi naskiĝis la 15-an de decembro.*
***C*** *: Ŝi naskiĝis je la 15-an en decembro.* ***D*** *: Ŝi naskiĝis en 15-a de decembro.*

7. **A**: Unu litro da lakto kostas unu eŭro. **B**: Unu litro de lakto kostas unu eŭro.
**C** : Unu litro da lakto kostas unu eŭron. **C** : Litro de lakto kostas unun eŭron.

*8.* ***A*** *:Dum la leciono mi neniam dormas.* ***B*** *: Mi neniam ne dormas dum la leciono.*
***C*** *: Mi neniam dormas dum la lecionon.* ***C*** *: Dum la leciono mi neniam ne dormas.*

9. **A** : Post la manĝo mi promenas mian hundon. **B.** Post la manĝo mi promenas sen mia hundo.
**C:** Post la manĝo mi promenigas mia hundo. **D** : Post la manĝo mi promenas kun la hundon.

*10.* ***A*** *: Bonvolu diri al mi kiom horo estas .* ***B*** *: Bonvolu diru al mi kiom da horoj estas.*
***C*** *: Bonvolu diru al mi kia horo estas.* ***D*** *: Bonvolu diri al mi kioma horo estas.*

Solvo :

| *0.* | **1.** | **2.** | **3.** | **4.** | **5.** | **6.** | **7.** | **8.** | **9.** | **10.** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *B* | | | | | | | | | | |

## II. Skriba sinesprimo

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo: 8 poentoj**
**Proponita labortempo: 50 minutoj**

**Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi 13–15-linian (ĉ. 100-vortan) leteron!**
**Via letero enhavu ĉiun postulatan informon!**
**Ne forgesu la formalaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo)!**

---

### TEMO I.

Vi deziras korespondi kun eksterlandanoj, tial vi aperigis anoncon. Vi ricevis mallongan leteron el Kubo.
Respondu al tiu letero. En via respondo

- prezentu vin kaj vian familion
- skribu pri tio, kie vi laboras / studas
- prezentu mallonge vian landon kaj vian loĝlokon
- skribu pri viaj ŝatokupoj
- demandu tion, kio interesas vin pri via nova korespondamik(in)o.

**AŬ:**

### TEMO II.

Via amik(in)o venos al via lando. Vi tre ĝojas pri tio, sed bedaŭrinde en la tempo, kiam li/ŝi alvenos, vi ne estos libera. Skribu al via amik(in)o,

- kial vi ne povos atendi lin/ŝin en la stacidomo
- kiu atendos lin/ŝin anstataŭ vi, kiel aspektas tiu persono
- okaze de problemo kiel li/ŝi povas atingi vian loĝejon
- kiajn vidindaĵojn li/ŝi povus viziti sola kaj kiajn komunajn programojn vi planas.

## III. Lega kompreno

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo: 8 poentoj**
**Proponita labortempo: 40 minutoj**

### III/A.

**Legu la suban tekston kaj solvu la taskojn!**

**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 12**

**1. Legu la tekston kaj aldonu la vortojn el la listo.
Vian solvon skribu en la tabelon, fine de la teksto.
0 estas ekzemplo por vi. (10 poentoj)**

*~~aperis~~, aperigis, estis, ĉiĉeronis, gastis, konatiĝis, ligis, organizis, vizitis, vojaĝadis, volis*

En la lasta numero de *La esperantisto* (1895/5-6) __________ (0) du interesaj informoj pri la temo vojaĝo. La unua estis *Lingvo de velocipedistoj* (biciklistoj) el Sankt-Peterburga gazeto *Velosiped*. Tie la aŭtoro pledis por la uzo de Esperanto por biciklistoj, kiuj __________(1) eksterlanden.
Kaj la dua: "S-roj LANGLET kaj ETZEL el Upsalo faris en tiu ĉi somero grandan vojaĝon tra Rusio kaj multaj aliaj landoj de Eŭropo. Dum la tuta vojaĝo ili uzadis la lingvon Esperanto; ili ĉie __________(2) la lokajn esperantistojn, __________(3) ĉe ili kaj oni ĉie akceptis ilin tre ĝoje ... ".
En 1895 Valdemar LANGLET estis 19-jaraĝa studento, sed jam aktiva esperantisto, sufiĉe konata el la Esperanto-gazetoj. Tial volonte renkontis lin la unua esperantisto el la urbo Jalto (Krimea duoninsulo ĉe la Nigra maro) d-ro Ilja OSTROVSKIJ, kiu __________(4) praktiki la lingvan paroladon kun eksterlandano. La doktoro __________(5) la vojaĝon de la svedoj tiel, ke survoje ilin ĉie renkontis esperantistoj. En Odesa Esperanto-klubo ili __________(6) kun geedzoj Nikolao BOROVKO kaj Antonina ĈAJKOVSKAJA.
Antonina akompanis ilin al Jalto kaj __________(7) ilin tra la montara Krimeo. Ekde tiu tempo lin __________ (8) firma amikeco kun la familioj de OSTROVSKIJ kaj BOROVKO. La svedoj vojaĝis tra Rusio sur ĉevaloj. LANGLET poste ofte vizitadis Rusion, kelkfoje gastis ĉe la granda rusa verkisto Leo TOLSTOJ, konata kiel adepto de Esperanto. Pri siaj vojaĝoj li verkis la libron *Rajde tra Rusio* (svedlingve) kaj __________(9) multajn artikolojn pri siaj vojaĝoj en *Lingvo Internacia*, kies kunredaktoro li __________(10). Pri tiu vojaĝo aperis ankaŭ alia artikolo *Svedoj en Rusio* en la plej populara rusa *Vokrug Sveta (Ĉirkaŭ la Mondo*), gazeto pri turismo.

*(Laŭ artikolo el KONTAKTO)*

**Solvo:**

| | | |
|---|---|---|
| *0.* aperis | 4. | 8. |
| 1. | 5. | 9. |
| 2. | 6. | 10. |
| 3. | 7. | |

**2. Respondu laŭ la teksto. (2 poentoj)**

1. Kiun rolon havis Esperanto dum la vojaĝoj de Langlet ?

___

2. Pri kiuj vetur-manieroj parolas la artikolo de Kontakto ?

___

**III/B.**
**Legu la suban tekston kaj solvu la taskon!**
**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 8**

**Andreo CSEH gvidas sian unuan kurson**

Post la pastriĝo, en 1919 Andreo CSEH ricevis oficon kiel help-pastro kaj instruisto de religio en lernejo. Estis en la urbo *Hermannstadt* (Transsilvanio). Li estis tie helppastro.
Iun tagon oni frapis ĉe lia pordo en la paroĥejo, kie li loĝis. Venis sinjoro kaj sinjorino, ili prezentis sin kaj diris:
„Ni venis por peti vian helpon, ĉar en nia organizo de laboristoj estas diversaj popoloj kun diversaj lingvoj, sed ni ne scias la lingvon unu de la alia. Ĉiu uzas nur sian gepatran lingvon. Ni aŭdis de iu – estis poŝtisto aŭ iu ĉe la poŝto – ke venas leteroj al persono, al iu strangulo, kiu komprenas ĉiujn lingvojn. Ĉu vi povas helpi nin?” CSEH respondis: „Estas nur Esperanto. Jes, mi volonte helpos vin, sed kiel?”
„Nu, venu al la instrudomo doni kurson.”
„Bone, revenu post unu semajno, kaj tiam ni priparolos kion fari.”
Ili foriris kaj CSEH kuris por aĉeti librojn.
Post unu semajno la sinjoroj revenis. Andreo CSEH tre bedaŭris, sed li ne sukcesis akiri lernolibrojn. Li havis nenion, ĉar pro la postmilita revolucio la poŝto ne funkciis, sekve li ne povis mendi librojn. La du personoj insistis kaj CSEH petis ankoraŭ unu semajnon por pripensi kion fari.
Kiam li vizitis sekvasemajne la kunvenon, tie li trovis 23 lernemulojn. Ilia entuziasmo kaptis Andreon CSEH, kaj li faris miraklon. Sen libroj, sen instruista praktiko li komencis interparoli kun ili, gvidi konversaciojn. Post du aŭ tri monatoj la lernantoj sufiĉe bone kapablis paroli Esperanton kaj el tiu grupo formiĝis poste vasta laborista Esperanto-movado en la urbo *Hermannstadt*.

*(Laŭ K. Smidéliusz: Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh)*

**Decidu ĉu la subaj asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M)!**

| | V | M |
|---|---|---|
| 1. En 1919 Andreo CSEH laboris en religia lernejo. | | |
| **2.** Foje gesinjoroj vizitis la help-pastron en lia loĝejo. | | |
| **3.** Iu poŝtisto diris al ili, ke Andreo CSEH parolas Esperanton. | | |
| **4.** La viro kaj virino estis reprezentantoj de la laborista organizo. | | |
| 5. Pasis minimume du semajnoj inter la invito kaj la unua leciono. | | |
| **6.** Li ne povis mendi librojn ĉar la poŝto-reto ne funkciis. | | |
| 7. La kursanoj tre volis lerni kaj progresis bone. | | |
| 8. Andreo CSEH jam tiam estis sperta instruisto. | | |

**Meza nivelo (B2)**
E1-B2_IRA_5

## I. Lingvokonaj taskoj

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Proponita labortempo: 40 minutoj**

**Solvu la subajn taskojn!**

**1. Elektu la ĝustajn prepoziciojn kaj skribu ilin sur la liniojn.
Vi rajtas uzi ĉiun prepozicion nur unufoje.
Kvar el la listo estas superfluaj. (5 poentoj)**

***da, de, el, ekster, kun, per, por, pri, pro, post,
sen, sub, tra, trans***

1. Okazis nenio ________________ kio vi devus maltrankviliĝi.
2. __________ duhora marŝado ni haltis ripozi.
3. Roberto estas la plej alta ______________ inter la infanoj.
4. Ne zorgu _____________ tio,
5. kio estas _____________ via scio.
6. ______________ Dio vi iras ĉien,
7. ____________ Dio vi iras nenien.
8. Ni formanĝis nur la duonon ___________ la naskiĝtaga kuko.
9. Kiu komencas juĝon, iras ___________ jugon.
10. La aŭto restis en la tunelo, ĝi paneis kiam li veturis ________ ĝi.

**2. Mankas el la subaj frazoj afiksoj (kiel ekz. –id, -ej ktp.).**
**Enskribu ilin laŭ la senco de la frazoj. (5 poentoj)**

1. Mia avino iĝis tre forges______a, nuntempe ŝi ofte ne memoras aferojn.
2. Kvin_____e kvin estas dudek kvin.
3. La ĉas_______oj kaptis la cervon.
4. Oni instalis novan fornon en la kuir______on.
5. Gregoro _______komprenis mian leteron kaj ofendiĝis.
6. Pri la ______fama polikisto oni denove skribis en la ĵurnaloj pro liaj seksskandaloj.
7. Mi konsilas al vi spekti la novan filmon, ĝi estas tre bona, vere vid_______a.
8. La muziko estis tiel laŭta, ke ĝi estis aŭd_____a eĉ en la najbara strato.
9. La long______o de Nilo estas 6650 metroj.
10. Antaŭ kelkaj semajnoj naskiĝis la reĝ_____o, kiu heredos la tronon kiam lia patro mortos.

**3. Mankas pronomoj (mia, via, lia, ŝia, sia ktp) el la teksto. Enskribu ilin en la suban tabelon, tiel, ke la formoj estu gramatike akordigitaj kun la frazo. (5 poentoj)**

Sinjoro Griza decidas aĉeti kristnaskajn donacojn por __1__ familianoj. __2__ edzino tre ŝatas legi, do li planas aĉeti interesajn librojn por ŝi. Li kaj __3__ edzino kune elektos la novan biciklon, kiun ricevos Helena, __4__ filino. Antaŭ nelonge oni ŝtelis __5__ biciklon kaj nuntempe ŝi devas ĉiam pruntepreni la biciklon de __6__ frato. Francisko, la filo de la gesinjoroj Griza tre ŝatus havi propran televidilon, do la gepatroj decidis donaci __7__ malnovan televidilon al li kaj aĉeti tutnovan aparaton por si mem. La hundo de la familio ricevos novan korbeton.
La gesinjoroj Griza en la proksima aĉetcentro sukcesis trovi televidilon kaj donacon por Helena kaj por la hundo, do ili jam havas __8__ biciklon, __9__ televidilon kaj __10__ korbeton.

**Solvoj:**

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | | 6. | |
| 2. | | 7. | |
| 3. | | 8. | |
| 4. | | 9. | |
| 5. | | 10. | |

**4. Elektu el la kvar ebloj la ĝustan vorton por plenigi la spacon, kaj skribu ties literon en la tabelon sube. (5 poentoj)**

1. **Vi sukcesis kolekti ĉiujn eldonaĵojn de tiu libro, ________________________ via kolekto estas kompleta.**
   a) kun la miaj libroj b) kune kun miajn librojn
   c) per miaj libroj d) kun miaj libroj

2. **Mia edzo invitis ankaŭ Markon, __________ estis bona ideo.**
   a) tio b) tion c) tiu d) tiun

3. **La forpasinto estis sepdek jar_________ aĝa.**
   a) a b) on c) oj d) ojn

4. **Nia aŭto difektiĝis, ni decidis ripar________ ĝin al nia najbaro.**
   a) i b) igi c) iĝi d) adi

5. **Georgo estas muzikisto. Li ludas ________ gitaro __________.**
   a) Ø – Ø b) Ø – n c) per – n d) sur – Ø

6. **- „____________ oni ne akceptis?”**
   **- „La mian.”**

   a) De kiu ekzameno b) Kian ekzamenon
   c) Kies ekzamenon d) Ĉu la vian ekzamenon

7. **Dum la kongreso mia edzo ______________ tre bone.**

   a) fartis sin b) amuziĝis c) pasis d) sentis

8. **Post la verbo ’estas’ __________ uzi akuzativon.**

   a) neniam ne b) ne necesas c) neniam bezonas d) ne devas

9. **___________ la menditaj krespoj la kelnero portis al mi gulaŝon.**

   a) Apenaŭ b) Anstataŭ c) Spite al d) Malgraŭ

10. **Pro ripetiĝinta eraro ni devis _______________ refari la laboron.**

    a) trione b) trifoje c) trioble d) tri fojon

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | |

## II. Skriba sinesprimo

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo: 8 poentoj**
**Proponita labortempo: 60 minutoj**

**Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi 17-20-linian (ĉ. 150-vortan) leteron. Via letero traktu ĉiun proponitan eron, sed ĝi ne superu la postulatan longecon; atentu pri la kohereco de via teksto.**
**Ne forgesu la formalaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo).**

### TEMO I.

Via amik(in)o demandas vin pri via libertempo. En via respondo skribu pri tio,

- kiam, kie vi renkontas geamikojn, kion vi faras kune
- kiajn programojn vi rigardas en la televido, kial
- kiuj estas la plej ĝenaj bagatelaĵoj kiuj forrabas vian tempon
- kiujn gravajn taskojn vi havas, pro kiuj mankas al vi libertempo
- kion vi farus, se vi havus pli da tempo.

**AŬ:**

### TEMO II.

Via leteramik(in)o demandis vin pri via laboro. En via respondo skribu,

- kie kaj ekde kiam vi laboras
- kiajn taskojn vi devas plenumi
- kiajn karaktertrajtojn havas via ĉefo
- pri kio vi kontentas kaj pri kio vi malkontentas koncerne vian laboron
- kie vi preferus labori, se vi povus ŝanĝi, kial.

## III. Lega kompreno

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo: 8 poentoj**
**Proponita labortempo: 80 minutoj**

### III/A

**Legu la suban tekston kaj solvu la taskon.**

**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu ĉi parto estas: 8**

**Subkaŝita lingvo**

Manchán MAGAN estas juna irlandano, kiu lastatempe prezentis serion de televidprogramoj, en kiu li esploras la hodiaŭan staton de la irlanda lingvo. Kvankam, laŭ la nacia konstitucio, la irlanda (gaela) estas la unua oficiala lingvo de la lando, pro historiaj kialoj la angla estas nun la plej uzata. La kaŭzoj estas multaj. Dum la Granda Malsato en la mezo de la 19a jarcento, mortis aŭ elmigris (precipe al Usono) grandega parto de la gaelparolantoj, kiuj tiam estis la plimulto en Irlando. Plie, pro la fakto, ke la lando estis dum jarcentoj regata de Anglio, la angla iĝis la prestiĝa lingvo de administrado, komerco kaj edukado, do la irlanda estis malestimata kaj rigardata kiel idiomo de sensciaj kamparanoj. Ĉar milionoj de la posteuloj de la elmigrintoj nun loĝas en Usono, la nord-amerika influo en Irlando estas tiom fortega, ke kelkfoje oni preskaŭ havas la impreson ke Irlando estas, ne sendependa respubliko, sed la 51a ŝtato de Usono.

Pluraj enketoj indikis, ke la plimulto de la irlandanoj ne volas, ke ilia indiĝena lingvo malaperu, sed ne sufiĉe serioze klopodas por plibonigi ĝian endanĝerigitan staton. La aktuala registaro kaj la edukaj instancoj (malfrue) konscias pri la graveco de la situacio kaj asertas, ke ili intencas trovi rimedon por savi la lingvon kaj krei firmajn bazojn por garantii ĝian konservadon.

La rezultoj de la esplorado farita de MAGAN estis seniluziigaj kaj senkuraĝigaj. Multaj junuloj montris sin indiferentaj. Homoj, kiuj okupis postenojn, en kiuj ili devus paroli kaj uzi la lingvon, ne povis, aŭ ne volis. Malgraŭ la fakto, ke la irlanda estas ĉie instruata (krom en Nord-Irlando, kie ĝi estas studobjekto preskaŭ nur en katolikaj lernejoj), junuloj forlasas la lernejon kun minimuma lingva kapablo. Multaj diras, ke ili ne kapablas legi ĝin. Kompreneble estas esceptoj.

*(Laŭ la artikolo de Garvan MAKAJ el Monato)*

**1. Finu la frazpartojn de la maldekstra kolumno trovante ilian finon en la dekstra kolumno. La parojn de cifero kaj litero skribu en la suban tabelon. Atentu, estas je unu pli da finoj ol estas necese.**

| | |
|---|---|
| 1. Kvankam la angla lingvo ne estas agnoskita kiel oficiala lingvo | a) dum jarcentoj regis angloj en la teritorio. |
| 2. Malgraŭ tio, ke oni en Irlando volas konservi sian lingvon | b) estas malmulto farata konkrete por ĉesigi ties endanĝerigitan staton. |
| 3. La irlanda lingvo perdis sian prestiĝon kiam | c) dum la mizera, sennutraĵa periodo en la mezo de la 1800-aj jaroj. |
| 4. Tiom fortas la influo de Usono en Irlando, ke | d) ĝia uzo estas la plej ofta en Irlando. |
| 5. Fininte siajn studojn la junuloj ne regas la irlandan eĉ se | e) multaj asertas ke ili ne scipovas la lingvon. |
| 6. El la enketo ni scias, ke | f) ili montris pretecon je agoj por la savado de la lingvo. |
| | g) la lingvo estas instruata preskaŭ ĉie en la lando. |
| 7. Signifa nombro de la parolantoj de la irlanda lingvo forlasis sian patrujon | h) oni povus konsideri ĝin kiel la 51an ŝtaton de Usono. |
| 8. La respondeculoj komprenis la situacion, sekve | i) la juna generacio ne vere interesiĝas pri la estonteco de sia gepatra lingvo. |

**Solvo:**

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | |

**III/B**
**Legu la suban tekston kaj solvu la taskojn!**
**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 12**

1. **Trovu la lokon de la subaj vortoj en la teksto kaj skribu ilin en la suban tabelon. Du el la listigitaj vortoj estas superfluaj. (7 poentoj) 0 estas ekzemplo por vi.**

***bonkvalitajn, ĉirkaŭantaj, damaĝintaj, detruitaj, facilaj, kvadratajn, nekonatajn, protektantajn, satelitaj, ŝirmitajn***

**Praarbaro eltrovita dank'al *Google Earth***

En la 21-a jarcento la laboro kaj vivo de esploristoj eble estos pli ____0_______ danke al *Google Earth*. Dum ili provis difini la limojn de rezervejo por protekto de la naturo en Mozambiko pere de la fama softvaro kiu mapas la teron per ____1______ fotoj, biologoj de la Brita Reĝa Botanika Ĝardeno de *Kew* (sude de Londono) en 2005 trovis nekonatan zonon, kiu aperis pli verde ol la ceteraj ______2_____ zonoj. La esploristoj tiam akiris pli _______3______ bildojn, por precize scii kio estas tiu verda regiono.
Ili tiam konvinkiĝis pri la ekzisto de praarbaro en tiu ĉi zono, konata nur de la plej proksimaj enloĝantoj. Proksimume 80 _____4_____ kilometrojn vasta, ĉi tiu densa zono troviĝas apud la Monto *Mabu*, kiu neniam antaŭe estis kartografiita nek esplorita. Tri jarojn post tiu ĉi eltrovo en *Google Earth*, internacia teamo de 28 sciencistoj sekve ekiris, en novembro 2008, por esplori ĉi tiun novan nekonatan teron. Dum kvar semajnoj, ili trapaŝis ĉi tiujn pejzaĝojn ____5______ de iu ajn homa agado, por eltrovi densan kaj vivoplenan bestaron kaj vegetaĵaron. La sciencistoj enlistigis ĝis nun _______6______ specojn de insektoj kaj plantoj. Pro seninterrompa interna milito inter 1975 kaj 1992, la malmultaj vojoj kiuj kondukas al ĉi tiu regiono estis _____7_____ , kaj la tuta zono kvazaŭ dezertigita. La nescio pri ĝia ekzisto, ĝia malfacila aliro kaj la valoro de la arbaro, kie la enloĝantoj venis rifuĝi por eskapi batalojn, kontribuis al ĝia ĝisnuna protekto.
Ni esperu, ke tiu eltrovo de la sciencistoj ne endanĝerigas la ekologian sistemon!

(Laŭ la artikolo *Praarbaro eltrovita dank'al Google Earth*, www.eventeo.net)

**Solvo:**

| | |
|---|---|
| **0.** facilaj | **4.** |
| **1.** | **5.** |
| **2.** | **6.** |
| **3.** | **7.** |

**2. Baze de la artikolo respondu la sekvajn demandojn. (5 poentoj)**

1. Kiel la sciencistoj certiĝis pri la ekzisto de la praarbaro? (1 poento)

______________________________________________

2. Kio estis la rezulto de la esplorvojaĝo de la sciencistoj? (2 poentoj)

______________________________________________

______________________________________________

3. Kial estis malfacile atingi la arbaron? (2 poentoj)

______________________________________________

______________________________________________

**Supera nivelo (C1)**
E1_C1_IRA_3

## I. Lingvokonaj taskoj

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Proponita labortempo: 60 minutoj**

**1. Aldonu la mankantajn sufiksojn. Elektu el la suba listo, sed atentu: uzu ĉiun sufikson nur unufoje. En la listo estas tri superfluaj sufiksoj. (5 poentoj)**

**ad, aĵ, ar, ec, em, er, estr, il, ind, on, uj, ul, um**

1. La kompat_______aj (1) loĝantoj helpis la mizer_______ojn (2) per don______oj (3).
2. La best_______o (4) estas endanĝerigata de la homa ag______o (5).
3. Ili vagadis kune tra la pentr________a (6) regiono, kunportante nur akv_______on (7) kaj muzik_______on (8).
4. La bel_____ o (9) de tiu program_________o (10) estis eksterordinara.

**2. Kompletigu la verbojn per la sufiksoj –ig- kaj –iĝ-, se estas bezonate. (5 poentoj)**

1. Baldaŭ estos la naŭa horo, tuj komenc-_________-os (1) la ekzameno.
2. Ne tim-________-u (2) vian fratineton per tiu ludilo! – atent- ________-is (3) la patrino sian filon.
3. Vek-______-u (4) min precize je la sesa!
4. Ne plen-__________-u (5) mian glason per malvarma akvo!
5. Ekmov-_________-ante (6) la aŭtomobilo puŝis lin.
6. Kaj nun, ĉiu fin-________-u (7) la skribadon!
7. Nia hundo kontente mov - _______ -as (8) sian voston se ĝi ricevas grandan oston.
8. Estas malvarme, vest-__________-u (9) vin varme!
9. La malatentema kelnero fal-___________-is (10) la telerojn.

**3. Kompletigu la suban rakonton per participoj! (5 poentoj)**

Antaŭhieraŭ mi ricevis retmesaĝon de mia hinda amiko: „Postmorgaŭ mi veturos al via urbo. La aviadilo alvenos je la deka kaj kvarono. Bonvolu atendi min!"

Mi pensadis: „Kiam mia amiko alvenos, mi havos labortagon, mi estos labor__________ (1). Kion fari?"

Elpres___________ (2) la leteron mi iris al mia ĉefo, kiun mi trovis parol___________ (3) al la sekretariino. Listig____________ (4) ŝiajn taskojn li demandis min, kion mi deziras. Mi montris al li la ricev___________ (5) leteron, kaj petis de li liberan tagon. Leg_________ (6) la leteron kaj rigard___________ (7) sian kalendaron li diris, ke en tiu tago ĝis la deka horo mi devos partopreni devigan prelegon. Poste mi povos iri al la flughaveno. Sed la veturo daŭras tridek minutojn! Reven___________ (8) al mia komputilo mi tuj sendis mesaĝon al mia amiko: „Kiam vi alvenos, mi estos ankoraŭ vetur___________ (9) al la flughaveno. Atendu min en la atendejo!"

Kaj nun mi estas jam en la flughaveno. Mia amiko staras apud mi kun la send___________ (10) mesaĝo en sia mano.

**4. Jen frazoj kun spacoj. Elektu el la kvar ebloj la ĝustan vorton por plenigi la spacon, kaj skribu ties literon en la tabelon sube. (5 poentoj)**

**1. Estas honorinde, ke tiun taskon vi _________ tiom rapide.**

A) plenumis B) plenigis C) pleniĝis D) plenadis

**2. Krom la honorigataj lernejestroj partoprenis la feston ankaŭ _________ instruistoj.**

A) kelkaj de B) kelkoj da C) kelka de D) kelkaj

**3. Nikolao kaj _______ geamikoj iris en la arbaron por pluki nigrajn berojn.**

A) liaj B) la liaj C) siaj D) la siaj

**4. Lia patrino traktis sian filon jam _________ .**

A) plenkreskite B) plenkreskulon
C) plenkreskulo D) plenkreskulitan

**5. Post la morto de sia fianĉo ŝi _________ havis amindumanton.**

A) neniam B) neniam ne C) neniam pli ne D) neniam plu ne

**6. En someraj ferioj la genepoj pasigas _________ siaj geavoj.**

A) du semajnoj inter B) dum du semajnojn ĉe
C) du semajnojn el D) du semajnojn ĉe

**7. _________ vivi estas _________ facile – tekstas iu rusa kanto.**

A) Kantante … pli B) Kantente … plu
C) Kantante … la plej D) Kantate … pli

**8. Nia najbaro demandis _________ ni povas _________ lian hundon dum li ferias.**

A) ĉu … promeni B) ĉu … promenigi
C) se … promeni D) se … promenigi

**9. _________ tago estas hodiaŭ? Merkredo.**

A) Kia B) Kioma C) Kiu D) Kies

**10. Delonge ne pluvis. Mi _________ akv_________ la plantojn.**

A) necesas … -umi B) devas … -igi
C) necesas …- igi D) devas … -umi

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | |

## II. Komentariado

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo estas kune kun la tasko III.: 16 poentoj**
**Proponita labortempo: 60 minutoj**

**Legu la suban tekston kaj prezentu vian opinion pri la temo!**
**Amplekso de la komentario: 20-25 linioj**

Dum la lastaj jardekoj la vivdaŭro dank' al la medicina scienco plilongiĝis. La nombro de la maljunaj homoj en la socio plikreskis. En Usono la plej multaj maljunuloj kapablas servi sin, informas la *The New York Times Magazine*. Ili havas pli multajn havaĵojn ol multaj junaj geedzoj. Sed la maljunuloj estas utilaj ne nur el materialaj vidpunktoj. Ili zorgas pri la infanoj, kiam la gepatroj laboras. La ĉefan rolon havas precipe la avinoj. La maljunulojn karakterizas saĝeco, kiu estas valora por la tuta socio.

*(laŭ Bazaro 2004.28.)*

## III. Skriba sinesprimo

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo estas kune kun la tasko II.: 16 poentoj**
**Proponita labortempo: 60 minutoj**

***Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi 20-25-linian (ĉ. 200-vortan) leteron. Via letero traktu ĉiujn proponitajn erojn, sed ĝi ne superu la postulatan amplekson. Atentu pri la koherecco de via teksto.***
***Ne forgesu la leterformalaĵojn (alparolo, saluto, dato, subskribo).***

---

### TEMO I.

Skribu leteron al vi amik(in)o, en kiu vi

- mencias, ke oni povas akiri filmojn tra la interreto
- prezentas vian opinion pri tiuj hejmaj kinejoj
- skribas pri tio, kiagrade ili influas la libertempajn kutimojn
- mencias kelkajn malavantaĝajn efikojn
- resumas vian opinion pri la socia rolo de la interreto.

AŬ

### TEMO II.

Skribu leteron al la redakcio de *Radio Varsovio*, en kiu vi

- rakontas pri tio, ke ekde kiam kaj kiom ofte vi aŭskultas la elsendojn
- esprimas vian opinion pri la programeroj (novaĵoj, intervjuoj, notoj)
- priskribas la rolon de la parolistoj en la influado de Esperanta elparola normo
- argumentas pri la graveco de la Esperantlingvaj radio-elsendoj
- bondeziras al la kunlaborantoj de la radio.

## IV. Lega kompreno

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**
**Atingenda minimumo estas: 8 poentoj**
**Proponita labortempo: 60 minutoj**

### IV/A Legu la tekston kaj solvu la taskon.

### Andoj

Laŭlonge de la okcidenta marbordo de Sud-Ameriko, ekde Antiloj ĝis Antarktio, etendiĝas Andoj, la plej longa montoĉeno sur nia blua terglobo.
En la foraj kretaceaj tempoj, antaŭ 20 milionoj da jaroj, faltiĝis, faŭltiĝis kaj diaklaziĝis la ____1____j fortoj kaj elementoj, suprenpuŝante la andan grundon, je miloj da metroj super marnivelo, por pliproksimigi ĝiajn suprojn al la stelplena ĉielo.
Superflugita iam de kondoroj kaj superflugata nuntempe de ĉiukoloraj papilioj, merloj, palumboj, paseroj, hirundoj, kaj ____2____j vulturoj, ĉiu ĝia falto, deklivo, krutaĵo kaj krutegaĵo estas vera defio al ĝia ____3____ kaj inĝenia loĝantaro.
Kio unuavide ŝajnus vera malbenaĵo de la sorto por aliloka loĝantaro, estis ĝuste tio, kio savis kelkajn andajn popolojn de certa pereo sub la batoj de senkompataj invadintoj: sieĝite de persekutantoj, ili rifuĝis sur tiaj altaĵoj, kie spirado ja estis tute neebla por la ____4____j pulmoj de fortaj kaj ____5____j malamikoj.
Prikultivantoj de ____6____j terpecetoj, loĝantaj sur la randoj de verdaj kaj ____7____j abismoj, malproksime de la urbaj lumoj kaj vantaĵoj, kiuj tamen kantadas kaj ĉiumomente benas sian ____8____n ekzistadon.
Pli-malpli 30 superbaj aktivaj vulkanoj, inter sennombraj jam delonge ____9____j, kaj longega ĉeno da montsuproj kronitaj de eternaj neĝoj, staras kvazaŭ serenaj atestantoj de la eventoplena, sed ne tre konata, anda historio kaj kiel ____10____j elrigardantoj de Amazono kaj la vivopulsaj brazilaj valegoj kaj ĝangaloj, kies loĝantoj siavice kaj propraokule ja tre bone havas la okazon kompreni la ĝustan kaj videblan signifon de nia nomo: Andaj Ondoj.

*(laŭ http://www.geocities.com/andajondoj/jan2005/20051-revuo.htm)*

**Enmetu la mankantajn adjektivojn, kiujn vi trovas sube en alfabeta ordo, en la ĝustan lokon de la supra teksto. (Indiku en la tabelo la literkodojn). (10 poentoj)**

a) dekliva
b) estingiĝinta
c) fascinata
d) hardita
e) nealkutimiĝinta
f) profunda
g) sangavida
h) sporada
i) subtera
j) surmonta

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | |

## IV/B Legu la tekston kaj solvu la taskon.

- Amataj steloj! – li diris mallaŭte, - bone konataj, kiel la trajtoj de la amatoj, kiuj ne estas plu. Kiel mirinda estas la mano, kiu senerare vin gvidas! Kaj ĉu ne gvidas tiu sama mano, same senerare, la homajn aferojn, la sekretajn aferojn de koroj, dediĉitaj al Vi? Mi ne petas, Eternulo, ke vi lumigu per brila lumo mian teran vojon. Donu al mi nur en la koro radieton, trankvilon, kaj helpu al via sklavo ekpaŝi sentime; sen timo pro mi mem; pro miaj duboj; pro mia … pasio!
Rimarkinte la malaperon de la brila stelo, li subite rektiĝis kaj rigardis la orientan ĉielon. Ne pli frue ol tiam, li sentis, ke liaj membroj rigidiĝis de la malvarmo. […]
La granda taglumiganto plenumis preskaŭ kvaronon de sia flama vojo. La tranoktinto troviĝis jam kelke da mejloj for de sia soleca haltejo, kaj nun vigle iris suden laŭ longuzita karavanvojo, portante sian pezan mantelon per la lanco, metita trans la maldekstran ŝultron. Li surhavis blankan, zonitan tunikon kun mallongaj manikoj, kiu lasis preskaŭ tute nudaj la sunbrunigitajn brakojn kaj, malsupre de la genuoj, la fortmuskolajn krurojn. Liaj piedoj estis vestitaj per ledaj sandaloj. Ĉirkaŭ la muskolaĵo de la maldekstra brako li portis oran braceleton kvin centimetrojn larĝan, kaj ornamitan per seso da grandaj turkisoj; kaj ĉirkaŭ la kapo similan, sed malpli larĝan kaj malpli dikan strion, ordotenantan al li la kapoveston. […] La fizionomio de la viro, kiu havis la aĝon de kvardek jaroj, estis alloga, pensema kaj nobla. Lia tuta sinteno estis plena de digno.
La regiono, tra kiu li pasis, estis bela kaj ridetanta en la matena sunlumo. Ondoformeco de la tero, kaj multaj disaj aretoj de la arboj, pleje kverkoj, terebintarboj kaj cipresoj, donis al la pejzaĝo tre plaĉan aspekton. Sed la tuta lando estis ankoraŭ virga, kaj la sola homa signo estis serpentumanta, ŝajne senfina karavanvojo.
Atinginte la supron de la malgranda altaĵo, la viro ekvidis en kelka malproksimeco la atendatan de li karavanon, envolvitan en polva nubo. Ĝi estis longa karavano kun pli ol cent kvindek kameloj, el kiuj tri kvaronoj estis peze ŝarĝitaj per komercaj pakaĵoj kaj tendaĵoj.

*(laŭ Heinrich August Luyken: Renkonto)*

**Decidu, ĉu la sekvaj asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M) laŭ la teksto, aŭ ili tute ne estas menciitaj en la teksto (N)!**

| | V | M | N |
|---|---|---|---|
| 1. La viro dormis subĉiele. | | | |
| 2. La viro malsaniĝis pro la malvarmo. | | | |
| 3. La viro estis armita. | | | |
| 4. La viro, irante sur la karavanvojo, ne surhavis mantelon. | | | |
| 5. La viro verŝajne ofte pasigis la tempon sub la suna ĉielo. | | | |
| 6. La viro estis fuĝanta sklavo kun kurbiĝanta dorso kaj malbela vizaĝo. | | | |
| 7. La ĉirkaŭaĵo estis senhoma praarbaro. | | | |
| 8. La viro pasigos la nokton sola. | | | |
| 9. Antaŭ la okuloj de la viro klare reliefiĝis karavano. | | | |
| 10. Cent dudek kameloj portis vendotan akvon. | | | |

# SOLVOJ

## Solvo de la taskoj de la aŭda kompreno

**Baza nivelo (B1)**
**E1_B1_LAB_6**

### I.1. Kompletigu la frazojn surbaze de la aŭdita dialogo. (8p)

1. Por ekzameniĝi venis la lernantino, virino k.s
2. La ekzameno komenĉiĝos post kelkaj minutoj.
3. La sinjoro jam havas informojn pri la vigla hungara esperantista literatura vivo
4. kaj pri la eminentaj hungaraj verkistoj
5. La sinjoro volas aŭdi per propraj oreloj pri la lingvonivelo de la hungaroj.
6. La hungarlanda diplomo havas grandan prestiĝon en la tuta mondo, tutmonde ks.
7. La sinjorino nenion sciis pri Zamenhof.
8. La konversacio finiĝis, ĉar venis la profesoroj ks.

### I.2. Vera/Malvera (4p)

1. V 2. V 3. V 4. M 5. V 6. M 7. M 8. V

### La aŭdita teksto nr-o 1

Budapeŝta ekzameno

| | |
|---|---|
| ZAMENHOF: | Bonan tagon! |
| LERNANTINO: | Bonan tagon! |
| ZAMENHOF: | Pardonon... pardonon... Ĉu mi ne ĝenas vin, se mi demandas ion? |
| LERNANTINO: | Bonvolu demandi. Mi jam ne povas multe lerni. Post kelkaj minutoj komenciĝas la ekzameno. Ĉu ankaŭ vi venis por ekzameniĝi? |
| ZAMENHOF: | Jes, sed ne por ekzameniĝi. Mi multe aŭdis pri la vigla hungara esperantista literatura vivo. Pri la Budapeŝta Skolo. Pri la gazeto «Literatura Mondo», pri la eminentaj hungaraj verkistoj kaj bonegaj lingvistoj. Mi deziras per propraj oreloj aŭdi, kiel la hungaroj scias nian lingvon. |
| LERNANTINO: | Mi tamen proponas al vi akiri hungarlandan diplomon. |
| ZAMENHOF: | Mi pensas, ke mi jam sufiĉe konas la lingvon. |
| LERNANTINO: | Sed la Budapeŝta diplomo havas en la tuta mondo grandan prestiĝon. El multaj landoj venas samideanoj ĉi tien por ricevi hungaran diplomon. Ĉu vi scias, ke Hungarlando havas la plej multajn diplomitajn esperantistojn? |
| ZAMENHOF: | Mi gratulas. |
| LERNANTINO: | De kie vi venis? |
| ZAMENHOF: | El tombo. |
| LERNANTINO: | Ĉu el Tombo? Kie situas tiu urbo? |
| ZAMENHOF: | En Polujo. |
| LERNANTINO: | La poloj estas bravaj esperantistoj. Kaj ĉu vi bonvolus prezenti vin? |
| ZAMENHOF: | Ludoviko Lazaro Zamenhof. |
| LERNANTINO: | Zamenhof? Ĝi estas germana nomo, ĉu ne? |
| ZAMENHOF: | Ĉu vi ne aŭdis ankoraŭ mian nomon? |
| LERNANTINO: | Mi korespondas kun multaj polaj amikoj, sed ili havas polajn nomojn. |
| ZAMENHOF: | Kaj ĉu vi nun ekzameniĝos? En Budapeŝto? |

| | |
|---|---|
| LERNANTINO: | Jes. Sed bonvolu diri, kion signifas laŭvorte Zamenhof? |
| ZAMENHOF: | Laŭvorte tradukite: Semkorto. |
| LERNANTINO: | Ĝi sonas multe pli bele. Nia lingvo mem estas pli bela, ol ĉiuj nacilingvoj, ĉu ne? |
| ZAMENHOF: | Eble vi pravas. |
| LERNANTINO: | Pssst, venas la profesoroj. |

*(Laŭ la teatraĵo de S. Szathmári)*

**II. 1. Aŭskultu la rakonton kaj respondu la subajn demandojn. (8p)**

1. Kiom aĝa estas Lola? *Ŝi estas 14-jara/dekkvar-jara.*
2. Kia estis la vendistino en la butiko? *Ŝi estis afabla.*
3. Kian specialan materialon enhavis la kuko, kiun Lola mendis? *Ĝi enhavis mielon.*
4. Al kio similu la kuko de Lola? *Ĝi similu al koro.*
5. Kio mankis el la surskribo, kiam Lola la unuan fojon ekvidis ĝin? *Mankis la litero h.*
6. Maksimume kiom da minutoj havis la vendistino por korekti la eraron? *Ŝi povis labori/ korekti la kukon dum 30 minutoj.*
7. Kiom da fojoj Lola eniris la vendejon? *Ŝi eniris tien tri fojojn.*
8. Kial ne devis la virino enpaki la kukon? *Ĉar Lola tuj manĝis ĝin (en la vendejo).*

**La aŭdita teksto nr-o 2**

Lola aĉetumas

Lola estas romantika junulino, apenaŭ dekkvarjara.
Iun tagon, ŝi eniris en kukovendejon. La mastrino de la kukejo afable demandis al ŝi: "Kion vi deziras, juna fraŭlino?"
"Mi deziras kukon el mielo", respondis Lola, "kukon en formo de koro."
"Jen", diris la mastrino, "jen mi havas plurajn korformajn mielkukojn; vi povas elekti, laŭ via plaĉo."
"Mi volus havi .... ", daŭrigis Lola, "mi volus havi mielokukon, kiu surhavas nomon el sukero."
"Nu, kiun nomon vi volus havi sur ĝi?", demandis la mastrino.
"Arturo", klarigis Lola, kaj ŝia vizaĝo subite iom ruĝiĝis.
"Revenu post unu horo", diris la kukistino, "tiam vi havos vian mielan kukokoron kun la nomo Arturo.
Unu horon poste Lola revenis al la kukovendejo. Kiam ŝi ekvidis la bele preparitan korforman kukon, ŝi denove ruĝiĝis, kaj diris: "Estas eraro. La nomo de mia kuzo estas Arthuro, kun h post la t.
"Estas domaĝe", diris la mastrino, "ke vi ne diris tion antaŭe. Revenu post duonhoro; mi aranĝos la aferon."
Post duonhoro Lola revenis al la kukejo.
"Jen, juna fraŭlino", afable diris la kukistino, "jen alia koro el mielkuko, kiu surhavas la nomon Arthuro, kun h post la t, laŭ via deziro. Ĉu mi enpaku ĝin en donacpaperon? "
"Ne, dankon, sinjorino", respondis ĝoje la junulino, "tio ne estas necesa" kaj ŝi tuj ekmanĝis la mielkoron.

**Meza nivelo (B2)**
**E1_B2_LAB_4**

**I.1. Vera/Malvera**
1. M 2. V 3.M 4. V 5. V 6. V 7. M 8. V 9. V 10. V 11. M 12. V 13. V

**La aŭdita teksto nr-o 1**

Bona Espero estas municipa publika lernejo en Alto Paradiso en Brazilo.

Tie laboras kaj vivas du kvalifikitaj instruistoj salajrataj de la ŝtato. Ursula Grattapaglia, unu el la fondintoj, ne plu instruas, sed aktive partoprenas la proceson de edukado, havante apartan respondecon pri la infanoj. Ĉi tie ne okazas, kiel en la urbo, ke post kvar horoj da lernado la infanoj revenas hejmen kaj dum dudek pliaj horoj restas ofte en « kontraŭedukadaj » kondiĉoj. En Bona Espero la instruado kaj edukado estas daŭra proceso. Se post vespermanĝo oni montras filmojn al la geknaboj, parolas kun ili en Esperanto, ludas ŝakon, tiam ili samtempe lernas, amuziĝas kaj formas sian konduton. La instruistinoj kunestas ne nur en la klasĉambroj, sed en ĉiuj aliaj lokoj; en la domo, ludejo, manĝejo. La infanoj ne perceptas tion kiel kontrolon, sed kiel naturan familian vivon. Ili ĉiumomente povas iri al Ursula kaj Giuseppe, por montri sian novan desegnaĵon, por ridi, por plori aŭ simple trovi konsolon. Kompare kun la urbaj lernejoj ĉi tie estas pli multaj lecionoj. En Bona Espero la infanoj lernas ne nur antaŭ tagmanĝo sed ankoraŭ ekde la unua ĝis la kvina horo posttagmeze.

Antaŭe estis kvar klasoj, sed nun fakte estas kvin. Kun la nova edukreformo plilongiĝis la deviga baza lernado ĝis naŭ klasoj, sed tiamaniere, ke la pli frua antaŭlerneja klaso nun fariĝas la unua. El la naŭ klasoj en Bona Espero oni havas nur kvin klasojn.
Kial? La respondo estas simpla. Bona Espero daŭre agas sur rando de siaj ekonomiaj eblecoj. Por garantii dignajn vivkondiĉojn kaj altan instrunivelon al la infanoj, ilia nombro en la aktualaj cirkonstancoj ne povas superi tridekon. Nur por tiom da infanoj oni povas certigi kvar manĝojn tage. Sed tio estas nur parto de la elspezoj. Konsideru, ke Bona Espero ekzistas danke al esperantistoj. La brazila ŝtato subvencias ĉiun infanon per kvarono de realo tage, kio egalas al dek eŭrocendoj kaj sufiĉas por unu bulketo. Krom tio oni havas senpage la elektran energion kaj lernolibrojn, sed ĉiujn aliajn materialojn, inkluzive de vestaĵoj, Bona Espero mem devas aĉeti por la gelernantoj.

***(laŭ R. Dobrzynski. Bona Espero)***

**II.1. Kiu varo devenas el kiu lando? (4 poentoj)**

- porcelano el Ĉinujo / Ĉinio
- brokantaĵoj el Grekujo / Grekio / Greklando
- ŝtalo el Hindio, Hindujo, Barato
- teksaĵoj el Jemeno

**II.2. Respondu la subajn demandojn skribante plenan frazon. (po 2 poentoj, sume 8)**

1. Li estis komercisto.
2. Li havis 100 kamelojn.
3. Ĉar la klimato estas agrabla.
4. Ĉar li emeritiĝos / ĉesos ĉiun komercadon ktp.

**La aŭdita teksto nr-o 2**

Rakonto de Sadi pri fanfarona vojaĝanto
Iufoje mi renkontis komerciston, kiu havis ŝarĝon de cent kameloj, kvardek sklavojn kaj servistojn. Iun vesperon en la insulo Kiŝ, li prenis min en sian ĉambron kaj la tutan nokton li neniam ĉesis paroli laŭ fanfarona maniero dirante: "Mi havas tian korespondanton en Turkestano, kaj tian agentejon en Hindustano; kaj ĉi tiu papero estas la kontrakto de tiu terpeco, kaj por tiu afero mi havas tiun personon kiel garantiulon."
Jen li diris: "Mi intencas iri al Aleksandrio, ĉar la klimato estas agrabla"; jen li diris: "Ne, ĉar la okcidenta maro estas tumulta. Ho, Sadi! Mi devas havi unu pluan vojaĝon, kaj kiam mi faros tion, mi emeritiĝos por la resto de mia vivo kaj ĉesos ĉian komercon."
Mi demandis: "Kia vojaĝo estos tio?"
Li respondis. "Mi prenos persan sulfuron al Ĉinujo, ĉar mi aŭdis, ke ĝi alportas mirindan prezon tie; kaj de tie mi prenos porcelanon al Greklando, kaj grekan brokantaĵon al Hindujo, kaj hindan ŝtalon al Alepo, kaj spegulojn de Alepo al Jemeno, kaj striitan teksaĵon de Jemeno al Persujo. Post tio, mi ĉesos la komercadon kaj restos hejme en mia butiko."
Li daŭrigis dum kelka tempo vagante laŭ tiu tono, ĝis li ne plu havis potencon eligi unu vorton.

***(Laŭ materialo el 'La Trezoro de arabaj proverboj kaj anekdotoj')***

**Supera nivelo (C1)**
**E1_C1_LAB_2**

**I.1. Aŭskultu la tekston pri subtera medioprotektado kaj decidu ĉu la subaj asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M)! ( 10 poentoj)**

1. M 2. V 3. V 4. M 5. M 6. V 7. M 8. M 9. V 10. M

**I.2. Plenigu la tabelon laŭ la sama teksto! (12 poentoj)**

| | |
|---|---|
| 1. La kreskantan rubamason oni deponas en rubejoj kune kun | la likvaj rubaĵoj. |
| 2. Al aparte manipulata deponejo alvenas | la forigitaj izotopaĵoj de la atomcentralo. |
| 3. Ĉe rubejoj kun malkonvena teknologio oni devas kalkuli je | poluciado de la aero, grundo, sur- kaj subteraj akvoj. |
| 4. Norde de la ĉefurbo okazis | la plej granda subtera akvopoluciado. |
| 5. La homoj ne fariĝis viktimoj, ĉar | la akvopolucio estis ĝustatempe observita. |
| 6. Oni ŝanĝos la poluciitan grundon | por preventi pluan median poluciadon. |

**La aŭdita teksto nr-o 1**

Entrepreno pri geodezio kaj grundekzameno

La subtera medioprotekta agado de la entrepreno FTV havas la sekvajn taskojn:
- ekzameno de areoj konvenaj por deponi solidajn kaj likvajn rubaĵojn,
- mezurado, ekzamenado de ekzistantaj poluciadoj kaj rubdeponejoj, prilaborado de la protekto-manieroj,
- limigo de sur- kaj subteraj akvopoluciadoj,
- rekultivado de forlasitaj subĉielaj minejoj.

Speciale multe da zorgo donas la solidaj kaj likvaj rubaĵoj de la loĝlokoj, industrio kaj agrikulturo. Ĉiujare kreskas la rubamaso, kies plej granda parto estis deponita en rubejoj kune kun la likvaj rubaĵoj (sedimentaĵoj de kloakakvo). Krom tiuj – precipe pro industriaj procezoj – produktiĝas ankaŭ toksaj kaj radioaktivaj rubaĵoj en granda kvanto, forte danĝerigantaj la medion. Oni devas ilin manipuli kaj deponi en aparta tutlanda reto de specialaj deponejoj, ekster la kutimaj lokaj rubejoj. Ankaŭ la forigataj izotopaĵoj de la atomcentralo alvenos al tiaspeca, aparte manipulata deponejo.
La entrepreno FTV jam de pluraj jaroj partoprenas esploradojn por elekti nature taŭgan areon de izotoptombejo.
Por minimumigi la medio-poluciadon ĉe rubejoj, ege gravas apliki la specialajn metodojn pri lokindiko kaj funkciigo de rubejoj. En la lando nuntempe multaj lokaj rubejoj funkcias per malkonvena depon-teknologio, krome en loko netaŭga laŭ geologia vidpunkto. Ĉe tiuj rubejoj oni devas pli multe kalkuli je poluciado de la aero, grundo, sur- kaj subteraj akvoj.
En la lastaj jaroj la plej granda subtera akvopoluciado okazis norde de la ĉefurbo.
Pro difektiĝo de la bareloj, ankaŭ pro forfiltriĝo el la fosaĵoj de bruligo, la ege venena substanco parte eniĝis en la grundo, penetrante ankaŭ en la grundakvon. La tiel toksita grundakvo poluciis la putojn de la akvoprovizejo tiom, ke oni devis ilin elŝalti de la produktado por nedeterminebla

tempodaŭro. Tamen feliĉe, la akvopolucio estis ĝustatempe observita, sekve homoj ne iĝis viktimoj.
Por preventi pluan median poluciadon, oni decidis ŝanĝi la poluciitan grundon. La tiucelan esploradon, ekzamenadon kaj planadon plenumis la Entrepreno pri Geodezio kaj Grundekzamenado. Antaŭvideble daŭros longtempe ĝis tiuj tavoloj iom post iom repuriĝos.

*(Endre Dudich: Ĉu vi konas la teron?)*

**II. Kion oni ellernas dum adoptado de *politesse* en Francio?**

| | jes |
|---|---|
| bele surmeti la tablon | |
| kiel uzi la manĝilojn | x |
| kiel uzi la buŝtukon | x |
| kiel fiksi la kolumon | |
| manĝi malrapide | |
| vesti sin kiel artisto | |
| ĝui arton, desegnaĵojn, kantojn | |
| skribi afablajn leterojn | x |
| respekti aliajn | x |
| atenti sentojn kaj emociojn de la aliaj | x |
| regulojn de komuna vivado | x |
| plibeligi la ĉirkaŭaĵon | |
| kiel stiri aŭton | |
| observi trafikregulojn | x |
| fari specialajn gestojn | |
| esti tolerema | x |

**La aŭdita teksto nr-o 2**

La franca vorto *politesse* estas nocio vasta, multŝtupa. Dum oni iom-post-iome adoptadas ĝin, oni ellernas ne nur la ĝustan uzadon de manĝilaroj, ne nur kutimiĝas ne enŝovi la buŝtukon malantaŭ la kolumon kaj ne manĝi ŝmace. Oni ellernas ankaŭ decan konduton en la societo, la arton sin vesti kaj eĉ skribi leterojn en formo afabla.
La reguloj de konveneco en Francio signifas ne nur bonajn kondutmanierojn. Unuavice ili signas respekton por rajtoj, opinioj, sentoj kaj emocioj de la ĉirkaŭuloj. Krome, la bonvolan respektadon de la moroj kaj reguloj de la komuna vivado. Survoje - ankaŭ observadon de la trafikreguloj. Se iu malatentas la trafikregulojn en Parizo, du-tri aŭtistoj nepre signalos al la regulrompinto. Kaj ĉe aparte akcidentminaca delikto oni almetos fingron al la tempio kaj turnos ĝin kun subkomprena implico. Neniu faros similan geston tamen, se oni eldiras opinion diferencan de la aliaj, vestas sin siamaniere aŭ ekstravagance, ekokupas sin pri desegnado, kantado, versado. Toleremo estas konsista patro de la franca *politesse*.

*(Boris Kolker: Vojaĝo al Esperanto-lando)*

## Solvo de la skribaj taskoj

### Baza nivelo (B1)

**E1_B1_IRA_2**

### I. Lingvokonaj taskoj

#### 1. Enskribu la akuzativon (-n) tie, kie ĝi mankas. (2,5 poentoj)

*Por la korektanto!*
*Donu 0,25 poenton por ĉiu bona solvo, sed forprenu 0,25 por ĉiu malbona solvo.*
*La fina poento ne povas esti negativa cifero!*

Mi aĉetis unu kilogramo__n__ da banano_____. Hodiaŭ mi kunprenis 3 el ili____ al mia laborejo. Tagmeze mi manĝis du_____. La alia__n__ manĝos mia_____ kolegino_____ posttagmeze. Ŝi kunportis pomo__n__, sed preferas mia__n__ banano__n__.

#### 2. Starigu demandojn pri la substrekitaj frazopartoj. (2,5 poentoj)

1. Kie somerumis Maria?
2. Kio estas ŝia profesio?(Kio ŝi estas?)
3. De / Ekde kiam ŝi laboras en la universitato?
4. Kiel vestas sin ŝia filino?
5. Kiujn / Kiun vidas Petro ĉiumatene?

#### 3. La solvo de la testo

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| D | B | D | A | A | B | C | A | B | D |

### II. Skriba sinesprimo

**TEMO I.**

Kara Raul! Yport, la 10-an de aprilo 2008.

Mi tre ĝojas, ke vi respondis al mia anonco.
Mi loĝas en nord-okcidenta parto de Francio, en Normandio.
El la familio nur mi parolas Esperanton. Mi komencis lerni ankaŭ la hispanan, sed mi ne povas skribi al vi en tiu lingvo.
Mi havas tri pli aĝajn fratojn. Ili ne plu loĝas en la urbeto, ili studas en la universitato de Rouen.
Mia vilaĝo ne estas granda, estas en ĝi malgranda haveno, kaj multaj turistoj dum la somero.
Mi ofte iras promeni kun miaj geamikoj al la bordo de la oceano. Sed dum la semajno mi havas malmulte da tempo, ĉar mi lernas en mezlernejo. Ni estas en la lernejo de la oka matene ĝis la kvina vespere.
Kiom longa estas por vi la lerneja tago? Kiel vi pasigas vian liberan tempon?
Estos bone korespondi kun vi!
Ĝis. Stephane.

**TEMO II.**

Kara Tereza! Prago, la 24-an de majo 2008.

Mi tre ĝojas, ke vi venos! Mi ŝatus renkontiĝi kun vi en la stacidomo, sed bedaŭrinde mi havas gravan kunsidon tiam, kiam venos via trajno.
Mi petis anon de nia klubo atendi vin. Li estas pensiulo, alta, blankhara viro kun okulvitroj. Li havos verdan flagon en la mano. Li akompanos vin al mia hejmo. Mia patrino estos hejme, sed ŝi ne parolas fremdajn lingvojn.
Se estos problemo, voku min per poŝtelefono.
Mi estos hejme je la kvina horo. Vi povos ripozi, aŭ promeni en la kvartalo. Poste ni vizitos kune la centron kaj la kastelan kvartalon.
Salutas vin: Karel.

## III. Lega kompreno

**III/A .**
**1. Legu la tekston kaj aldonu la vortojn el la listo. (10 poentoj)**

| | | |
|---|---|---|
| | 4. volis | 8. ligis |
| 1. vojaĝadis | 5. organizis | 9. aperigis |
| 2. vizitis | 6. renkontiĝis (konatiĝis, estis, gastis) | 10. estis |
| 3. gastis (estis) | 7. ĉiĉeronis | |

**2. Respondu laŭ la teksto. (2 poentoj)**

1. Dumvojaĝe li uzis Esperanton (propagandis ĝin, renkontis Esperantistojn)
2. Pri biciklo kaj ĉevalo.

**III/ B.**
**Decidu ĉu la asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M). (8 poentoj)**

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| M | V | M | V | V | V | V | M |

## Meza nivelo (B2)

**E1_B2_IRA_5**

## I. Lingvokonaj taskoj

### 1. Elektu la ĝustajn prepoziciojn. (5 poentoj)

1. pro
2. post
3. el
4. pri
5. ekster
6. kun
7. sen
8. de
9. sub
10. tra (per)

### 2. Mankas el la subaj frazoj afiksoj. Enskribu ilin laŭ la senco de la frazoj. (5 poentoj)

1. em
2. obl
3. ist
4. ej
5. mis
6. fi
7. ind
8. ebl
9. ec
10. id

### 3. Mankas pronomoj (mia, via, lia, ŝia, sia ktp) el la teksto. Enskribu ilin en la suban tabelon, tiel, ke la formoj estu gramatike akordigitaj kun la frazo. (5 poentoj)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | siaj | 6. | sia |
| 2. | lia | 7. | sian |
| 3. | lia | 8. | ŝian |
| 4. | ilia | 9. | sian |
| 5. | ŝian | 10. | ĝian |

### 4. Elektu la ĝustajn solvojn (5 poentoj).

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| d | a | d | b | b | c | b | b | b | b |

## II. Skriba sinesprimo

**TEMO I.**

Kara Amikino! la 30-an de septembro 2008.

Pardonu, ke tiom longe mi silentis kaj ne reagis al via afabla letero. Vi ja scias, komenciĝis la lernojaro, kaj ambaŭ miaj genepoj vizitas jam lernejon. Tio signifas por mi okupon en ĉiu tago.
Posttagmeze mi atendas ilin antaŭ la lernejo, ni iras al la ludplaco por ke ili ludu iomete en la freŝa aero. Dufoje en la semajno ili havas trejnadon pri karateo en la sportcentro, tiam ni veturas tien per tramo. Estas ĉirkaŭ la sesa horo, kiam ni alvenas hejmen, ni vespermanĝas, ankaŭ la gepatroj alvenas ĉirkaŭ la sepa. Post tiu programo mi estas sufiĉe laca, ja mia rompita piedo bezonus

ankoraŭ pli da ripozo. Do mi sidiĝas antaŭ la televidilo kaj rigardas filmon. Mi ne tre ŝatas la programon de kutimaj kanaloj, ili estas tro vulgaraj.
Dum la tago mi havas tempon por mi. Ni regule naĝas kun tri amikinoj. Estas ankoraŭ bela vetero por naĝi en la subĉiela naĝejo. Mi esperas, ke tio helpos la resaniĝon de mia piedo, ĉar nun mi estas tro malrapida pro ĝi en mia laboro. Ankaŭ en la ĝardeno mi devus aranĝi la aŭtunajn florojn.
Mi esperas, ke vi bone fartas. Skribu, kiel vi festis vian naskiĝtagon!
Kun koraj salutoj: Anne

**TEMO II.**

Lunde, la 2-an de Junio

Kara amikino,
Mi esperas, ke vi bone fartas. En via letero vi demandas min pri mia laboro. Vi scias, ke mi estas delonge emeritino, tamen plaĉas al mi rakonti tiun epokon.
Dum dudek kvin jaroj mi instruis gimnastikon kaj sporton al lernantoj en mezlernejo. Multaj opinias, ke tiu fako estas malgrava; laŭ mi male, ĝi helpas junulojn plifortiĝi korpe kaj mense.
Dum la kursoj miaj gelernantoj ludis korbopilkon, piedpilkon, manpilkon aŭ retpilkon. Dank' al tio, ili lernis respekti la aliajn, akcepti malvenkon, batali por la kunludantoj.
Tio ne estis ĉiam facila, sed mi povis atingi tiun celon.
Krome, mi devis disvolvi ĉe la lernantoj multajn kvalitojn, kiel: rapideco, fleksebleco, forto, lerteco ktp. per diversaj ekzercoj. Grava programo, ĉu ne?
La direktoroj fidis siajn instruistojn, kondiĉe ke la lernantoj bone laboru.
Mia laboro kontentigis min dum multaj jaroj: labori kun infanoj estas mirinda afero. Sed ĉirkaŭ la fino de mia tempo de laboro, la instruado ŝanĝiĝis, ĝi iĝis pli malfacila pro diversaj kaŭzoj.
Kaj hodiaŭ mi preferas kultivi mian ĝardenon.
Tutkore: Odette

## III. Lega kompreno

### III/A.
**1. Finu la frazpartojn de la maldekstra kolumno trovante ilian finon en la dekstra kolumno.**

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| d | b | a | h | g | i | c | f |

### III/B.

**1. Trovu la lokon de la subaj vortoj en la teksto kaj skribu ilin en la suban tabelon.**

| | |
|---|---|
| *0. facilaj* | 4. kvadratajn |
| 1. satelitaj | 5. ŝirmitajn |
| 2. ĉirkaŭantaj | 6. nekonatajn |
| 3. bonkvalitajn | 7. detruitaj |

**2. Baze de la artikolo respondu la sekvajn demandojn. (5 poentoj)**

1. Ili akiris pli bonkvalitajn bildojn pri ĝi. (1 poento)
2. Ili trovis novajn specojn de insektoj kaj plantoj/densan kaj vivoplenan bestaron kaj vegetaĵaron. (2 poentoj)
3. Dum la militoj oni detruis la vojojn kiuj kondukis al la arbaro. (2 poentoj)

## Supera nivelo (C1)
**E1_C1_IRA_3**

## I. Lingvokonaj taskoj

### 1. Aldonu la mankantajn sufiksojn. (5 poentoj)

1. em
2. ul
3. aĵ
4. ar
5. ad
6. ind
7. uj
8. il
9. ec
10. er

### 2. Kompletigu la verbojn per la sufiksoj –ig- kaj –iĝ-, se estas bezonate. (5 poentoj)

1. iĝ
2. ig
3. ig
4. -
5. ig
6. iĝ
7. –
8. –
9. –
10. ig

### 3. Kompletigu la rakonton per participoj! (5 poentoj)

1. anta
2. inte
3. anta
4. inte
5. itan
6. inte
7. inte/ante
8. inte
9. anta
10. ita

### 4. Elektu el la kvar ebloj la ĝustan vorton por plenigi la spacon. (5 poentoj)

1. A
2. D
3. A
4. C
5. A
6. D
7. A
8. B
9. C
10. D

## II. Komentariado

Tiu fragmento de artikolo traktas la maljunaĝon, la socian rolon de maljunaj personoj.
Nuntempe la proporcio de pensiuloj kreskas en la industriaj socioj, parte pro la ŝanĝoj de la higieno, medicino kaj laborkondiĉoj, parte pro la malkresko de la naskiĝoj. Oni ofte diras, ke nuntempe malpli da aktivaj laborantoj devas provizi per pensio pli kaj pli da emeritoj. Sed pri tio ne parolas la artikolo, ĝi mencias nur tion, ke la plejmulto de la pensiuloj – en Usono – havas sufiĉe da monrimedoj kaj bonan sanstaton por povi profiti el tiuj rimedoj.
Ni ja ĉiuj konas la scenon, kiam turismajn lokojn vizitas busegoj da pensiulaj klubanoj. Pli-ol-sesdekjaruloj pli kaj pli multas ne nur en termobanejoj, sed ankaŭ en naĝejoj, ili volonte ekskursas piede aŭ per biciklo.
Samtempe la pensiuloj ne perdis la tradician rolon de zorganto pri la genepoj, kaj la heredigantо de saĝeco. Laŭ mia sperto tiu rolo tamen malpli graviĝis pro la fakto, ke pluraj generacioj de familio malofte vivas kune nuntempe. Pro la pli granda moviĝemo de la homoj, geavoj kaj genepoj povas loĝi en tute diversaj land- aŭ eĉ mondpartoj. Tio povas rezultigi ĉe la maljunuloj senton de soleco, kaj en tiu vivfazo, kiam ili tamen bezonas prizorgon, mankos aŭ nur malfacile organiziĝos la ĉeesta helpo de familianoj.
Do, tiu pensiula stato havas pli kompleksajn dimensiojn, kiujn ne mencias, eĉ ne aludas la recenzeto.

## III. Skriba sinesprimo

**TEMO I.**

Kara Federica, Venecio, la 8-an de Junio 2008.

Finfine mi kapblis akiri tiun retaliron ADSL, pri kiu mi parolis antaŭ kelkaj semajnoj. Kaj mi tuj komencis eluzi ĝin. Unu el la ebloj, certe interesa por kinamantino, kiel vi, estas elŝuti filmojn, kaj novajn, kaj malnovegajn. Verdire oni devus uzi laŭleĝajn retejojn, de kiuj, pagante per kreditkarto, oni povas elekti sian filmon el ampleksa propono. Tamen, preskaŭ ĉiuj (kaj mi kun ili) uzas senpagajn servojn, pere de softvaroj kiel *WinMx* kaj *eMule*, kiuj permesas interŝanĝi filmojn inter privataj uzantoj de la reto.
Sed ne ĉiuj filmoj taŭgas, laŭ mi, por esti spektataj hejme: ja mi ne posedas grandan televidilon, do mi devas rigardi la filmojn sur la ekrano de mia komputilo. Kaj, se tio taŭgas por normalaj filmoj, kie la rakonto rolas la ĉefan parton, ne estas bona solvo por tiuj filmoj, kiujn ni ege ŝatas, sciencfikciajn kaj fantastajn: ili bezonas specialan etoson, kiun donas nur grandega ekrano kun bonega sonsistemo. Do, malkovrinte tion, mi decidis uzi interreton nur por serĉi tiujn filmojn, kiujn mi maltrafis, kaj kiujn ne plu eblas spekti en bona kinejo.
Tamen, bonvolu ne kredi, ke mi pasigas la tutan tagon spektante filmojn elŝutitajn, kiel aliaj homoj faras forgesante, ke ekstere daŭre ekzistas suno; unu komputilo laboras la tutan tagon por mi por trovi la filmojn, sed mi elektos poste la taŭgan horon por rigardi ilin. Ili atendas min, kaj kiam mi decidas, ili revekiĝas. Tio estas bona uzo de interreto, por ne fariĝi sklavo de ĝi: mi konscias, ke tio estas danĝero lige al la tutmonda konektsistemo, tamen ĝuste pro tio mi intencas rajdi sur la tigro kaj ne esti manĝita de ĝi. Ĉu mi sukcesos? Mi esperas, ke jes… intertempe mi registris kelkajn filmojn, kiujn mi ŝategus spekti kun vi; simple elektu la tagon, kaj ni komencu.
Kison. Federico

**TEMO II.**

Bruselo, la 5-an de Junio 2008.

Al la Redakcio de Radio Varsovio

Estimataj Samideanoj,

Jam de kvar jaroj mi aŭskultas viajn elsendojn almenaŭ unu fojon semajne. Kompreneble ne ĉiuj programoj sammaniere plaĉas al mi. Mi aparte ŝatas aŭskulti intervjuojn, ĉar estas granda ĝojo kompreni per Esperanto homojn de aliaj landoj, eĉ se ne ĉiu parolanto prononcas tute bone nian internacian lingvon. Tial la parolistoj de via Radio havas gravan rolon en la formado de Esperanta elparola normo, ĉar ili estas tutmondaj ekzemploj kaj gvidantoj, ĉu ne? Estas grave, ke en la elsendoj oni povas aŭdi kaj konversaciojn pri ĉiutagaĵoj, kaj prelegojn pri sciencaj temoj.

Mi opinias, ke Esperantlingvaj radioelsendoj ludas gravan rolon en la disvastigo de parolata Esperanto, ĉar multaj esperantistoj loĝas en lokoj, kie ili ne povas paroli kun aliaj esperantistoj. Plie mi rimarkis, ke la konversacio per Esperanto kun samlingvanoj ne bone funkcias, ĉar oni sentas, ke estus multe pli simple kaj facile komunikadi nacilingve. Do, aŭskulti Esperantlingvajn elsendaĵojn certe kontribuas al la plibonigo de la parolata lingvo.

Dankante vin pro via bonkvalita laboro, mi deziras al vi kaj al ĉiuj viaj kunlaborantoj grandan sukceson kaj kore salutas vin.

Dominique Depoux

## IV. Lega kompreno

### IV/A

**Enmetu la mankantajn adjektivojn, kiujn vi trovas sube en alfabeta ordo, en la ĝustan lokon de la teksto. (10 poentoj)**

| 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| i | h | d | e | g | a | f | j | b | c |

### IV/B

**Decidu, ĉu la sekvaj asertoj estas veraj (V) aŭ malveraj (M) laŭ la teksto, aŭ ili tute ne estas menciitaj en la teksto (N)!**

1. N 2. M 3. V 4. V 5. V 6. M 7. M 8. N 9. M 10. M